# Heleco

Pres-organo de:
Astura Esperanto-Asocio


Numero 82 Oktobro - 2007




















# Heleco

Pres-organo de:
Astura Esperanto-Asocio

Numero 82 Oktobro - 2007



**Astura Esperanto-Asocio**

Sidejo: strato **Tomás y Valiente**, 1 -2ª etaĝo
33201-GIJÓN (ASTURIO-HISPANIO)

Interret-paĝo: http://uica.info/esperanto

Retadresoj: easturias@telecable.es
esperanto@uica.info


**Astura Esperanto-Asocio** estas esperantista rondo kiu plenumas sian rolon favore al la disvastigado de la Internacia Lingvo unualoke en nia urbo, Gijón, kaj ankaŭ, leŭeble, en tiuj partoj de la Asturia regiono, kie ne ekzistas lokaj grupoj de Esperanto.
Nia agado disvolviĝas kadre de:

## Cátedra JOVELLANOS de Extensión Universitaria

| Enhavo | Paĝo |
|---|---|
| ASTURA ESPERANTO-ASOCIO.- Nia dumjara laborado | 3-7 |
| Ĉu alianco de civilizacioj aŭ intercivilizacia milito; | |
| Problemoj de la paco kaj la milito | 8-10 |
| Pormilitaj elspezoj kaj armilar-industrio | 11-15 |
| Kristanismo kaj perforto en la historio de Okcidento | 16-21 |
| JIĤAD.- Kiel oni financas la terorismon en la nova ekonomio | 22-23 |
| Falintaj folioj | 24-25 |
| SPARTAKO | 26 |
| Anamorfoza surpavima pentr-arto | 27-29 |
| KLIMAT-ŜANĜO | 30-34 |
| Kuirante kun Pilar | 35 |
| TEMPLANOJ de post sep jarcentoj | 36-39 |
| La esperantistaro kongresas | 40 |
| 66a Hispana Kongreso de Esperanto | 41 |
| 92a Universala Kongreso de Esperanto | 42-47 |
| …kaj je ĉi tiu horo, iomete da roz-humoro | 48 |

**La enhavo de la tekstoj de ĉi-tiu revuo ne esprimas oficialan opinion de Astura Esperanto-Asocio: pri ili respondecas la verkintoj mem.**

**Leĝa Registro 0/319/85**



# Astura Esperanto Asocio

## NIA DUMJARA LABORADO


La celo de nia Esperantista Asocio estas la tipa kaj ĝenerala de ĉiu rondo de la Esperantista Movado, t.e. la promociado, de la Internacia Lingvo pere de propagando, kaj instruado pri la lingvo mem.




Rilate al la propagando favore al Esperanto, nuntempe nia ĉefa ilo estas la intereta paĝo de nia Asocio, kies alir-adreso estas:
http://uica.info/esperanto/
Tiu blogo estas nia vera fenestro al la mondo, al la mondo kiu interesiĝus pri nia afero kaj pretus kontribui al la solvo de la lingva problemo.
Nia ideo rilate al tiu paĝo estas publikigi en ĝi ĉiuspecan materialon cele montri ke pere de la Internacia Lingvo oni povas entrepreni kaj praktiki ĉiu ajn nivelon je komunikado. En nia paĝo oni povas trovi, krom informado pri la agado de nia Asocio, ankaŭ tradukaĵojn el naci-lingvaj verkoj, raportoj, artikoloj, kantoj, tekstoj pri historio, religio, politiko, filozofio, scienco, informadiko, recenzoj de libroj kaj filmoj… Nu, pri iuj el la menciitaj temoj ankoraŭ estas nenio en nia paĝo, sed la plano estas ke ĝi estu malfermata al ĉio ĉi. Tiurilate ni akceptas kontribuaĵojn de la geesperantistoj kiuj dezirus ion publikigi. La sola kondiĉo por la akcepto de materialoj estas tio ke la enhavo rezultu ofenda por neniu; temante pri ide(ologi)aj temoj la malakordo kaj malkonsento estas normala afero, sed la ofendado kaj insultado estas netolerebla.
Saman ideon ni havas rilate al ĉi tiu revuo, **HELECO**. Cetere, la propra revuo estas parto el la ret-paĝo, t.e. oni publikigas ĝin en la paĝo kaj krome ni planas enkonduki en la blogon la tutan kolekton de la revuo. Nun estas nur kelkaj el la lastaj numeroj, sed iom-post-iom oni aldonos la ceteron el la kolekto.
Kiel sciate, ĉiu esperantista revuo situiĝas en unu el du grupoj; la PER-Esperantaj kaj la PRI-Esperantaj. Ĉiuj periodaĵoj el ambaŭ grupoj estas POR-Esperantaj ĉar iuaŭ ali-maniere ĉiuj ili, nur pro la fakto ke ili uzas la Internacian Lingvon, kontribuas al la disvastigado kaj propagandado pri Esperanto. Sed PER-Esperantaj estas tiuj publikigaĵoj kiuj pere de Esperanto pritaktas ĉiuspecan temon, Dume, PRI-Esperantaj estas tiuj temantaj pri la Esperanto mem kaj la Esperantista Movado. Tiurilate, nia **HELECO** iamaniere iome apartenas al ambaŭ tipoj sed plejgrade ĝi estas PER-Esperanta. Ni pritraktas per la revuo ĉiutipan temaron pere de Espe-

ranto, sed ankaŭ iomete ni okupiĝas pri la laborado de la Esperantista Movado. Konkrete, en ĉi tiu numero ni iomete pritemas la ĉi-jarajn kongresojn de Esperanto, la Hispanan kaj la Universalan. Kompreneble, la PER-Esperanta materialo estas destinata al la ĝenerala publiko, konantoj kaj lernantoj de la Internacia Lingvo sed ne speciale interesataj pri la Esperantista Movado. Male, la PRI-Esperanta informado povas interesi ĉefe al la aktivuloj mem de tiu Esperantista Movado kaj estas ĉefe destinata al la membroj de nia Esperantista asocio.

Sed temante pri interna informado al la esperantistaj movadanoj oni devas aldoni ke nun nia Astura Esperantista Asocio havas alian inform-medion kiu, ankaŭ ĝi, estas enkondukata en la interret-paĝon. Ni temas pri la **AEA-Informilo**. Ĝi estas ne revuo, sed bulteno, kiu aperas pli ofte ol la revuo **HELECO** kaj estas dediĉata al nur informo pri la agado de nia Asocio kaj alia materialo interesa nur de vid-punkto de la Esperantista Movado. La Kreado de tiu informilo estis akordita en la antaŭlasta Asembleo de nia Asocio, kaj pasintan jaron estis eldonitaj la du unuaj numeroj. Ĉi-jare aperis la 3a kaj 4a numeroj.


A.E.A.-informilo

Numero 4 Septembro 2007

Nia E-Asocio en la inform-medioj

A.E.A.-informilo

Numero 3 Aprilo 2007

Forpasis William Auld

Mortis William Auld, unu el la plej grandaj esperantaj verkistoj de ĉiuj tempoj. Li naskiĝis la 6-an de novembro 1924, kaj forpasis matene la 11-an de septembro 2006, du monatojn antaŭ sia 82-a naskiĝtago. Auld estis la aŭtoro de poezia verko La Infana Raso, tre vera originalaĵo en nia Internacia Lingvo. Li estis aŭtoro ankaŭ de aliaj poeziaj verkoj: Tempo fugas, Pajleroj kaj stoploj, kaj ankaŭ pri Esperanto: Paŝoj al plena posedo, Pri lingvo kaj aliaj artoj, Traduka...

Li ankaŭ estis tradukisto de multaj verkoj en la angla lingvo al Esperanto, inter ili tiuj de Ŝekspiro (Sakespeare).

Por la internacia publiko William Auld iĝis pli konata en 1952, post la apero de la poemaro Kvaropo, kie li kunlaboris kun John Dinwoodie, John Francis kaj Reto Rossetti. Kvaropo signis la debuton ankaŭ de la nova eldonejo Stafeto, kiun fondis Juan Regulo Pérez en La Laguna en la Kanariaj insuloj. Tiu nova elstara eldonejo helpis ŝtopi la breĉon, kiun kaŭzis la malapero de la eldonejo de Literatura Mondo en Budapeŝto.

Homoj mortas, sed iliaj verkoj povas esti senmortaj, kaj la memoro pri William Auld vivos tiom longe, kiom en la mondo restos legantoj de libroj en Esperanto.

William Auld

Verkoj de William Auld

Tradukoj de William Auld

Inter tiu interna, PRI-Esperanta informado estas menciinda la Esperantista Festo de la pasinta jaro. Ĉiujare, la E-Movado kaj ene de ĝi la geesperantistoj de Asturio, en dato proksima al la 15a de decembro, datreveno de la naskiĝtago de Lazaro Ludoviko Zamenhof, aŭtoro de la Internacia Lingvo ESPERANTO, faras feston kun diverstipaj aktoj.

En la jaro 2006, la esperantistaro de nia regiono havis tiun feston la 17an de decembro. La esperantistaj grupoj de Gijón kaj Avilés sin sekvas jaron post jaro en la organizado de tiu festo, komuna por ambaŭ rondoj. En 2006 devis organizi la festajn aktojn nia E-Asocio de Gijón, sed ĉi-foje la loko ne estis tiu ĉi urbo sed Candás, apudmara urbeto kiu situas, proksimume, mezdistance de la du esperantistaj centroj de Asturio: Avilés kaj Gijón.

La unua akto estis meso en Esperanto en la preĝejo de Candás; oficis ĝin la jezuita pastro Jesús Angel Fernández. Tiu akto kaj la sekva promenado de la geesperantistoj tra la urbo estis sufiĉe fotita. La foto-raporto de tiu tago aperas sur la sekva paĝo.


La festado kulminis per la bankedo kiu sekve okazis en restoracio de tiu urbo. Post la manĝado mem, kiel kutime en tiaj okazoj, estis en tiu loko agrabla kaj amuza dumvespera kunrestado en kiu ne mankis kantado, deklamado…

Pri tiu festo, samkiel pri aliaj informoj de la vivo de nia E-Asocio estas pli ampleksa raportado en la menciitaj numeroj de **AEA-Informilo**.




# La 17a de decembro-2006
# ESPERANTISTA FESTO
# en CANDÁS





























Daŭrigante kun la raportado pri la agado de nia E-Asocio, indas nun mencii la ĉefan el niaj taskoj: la instruado pri la Internacia Lingvo.

De antaŭ multaj jaroj, ĉe ni gvidas la kursojn de Esperanto Santiago Mulas, iama Prezidanto de la Asocio kaj nuntempe Honora Prezidanto. Oktobre de la pasinta jaro li komencis novan Bazan Kurson kaj gvidis ĝis dum ties tuta unua trimonato. Sed dum la ferieto de la Kristnaska kaj Jarfina tempo li suferis gravan akcidenton.

Rezulte de faliĝo surteren, rompiĝis al li kelkaj ostoj kaj li devis esti hospitaligita kaj resti poste senmove dumlonge.




Nun, post ok monatoj, li estas jam sufiĉe, kvankam ne tute, resanigita. Sed en kio rilatas al la komencigita Esperanto-kurso estis necese aranĝi ties daŭrigadon dum la konvalesko de la instruisto. Dum la ceteraj du trimonatoj de la kurso gvidis la klasojn, ĉiulunde Carlos Enrique Carleos, kaj ĉiumerkrede Faustino Castaño.

Ĝenerale, oni daŭre uzis la ĝistiaman instrumetodon, t.e. la lerno-libro verkita de Miguel Gutiérrez Adúriz, sed krom tio oni enkondukis en la kurson iun novaĵon. Kiel ekzerco por praktiki la tradukadon de verkoj en Esperanto oni elektis iun hispanlingvan komikso-libreton, konkrete, tiun titolitan Alatristo, kiu inspiriĝis en la verkaro de la famkonata Arturo Pérez Reverte.

El tiu verko oni tradukis dum la kurso kelkajn paĝojn, kaj la tasko estas daŭrigebla en postaj kursoj aŭ en aliaj cirkonstancoj. Kiam la tuta broŝuro estos tradukita, ĝi estus bela elemento en la sekcio de tradukaĵoj de nia ret-paĝo. Sed oni ne povas fari tion sen la leĝa permeso de la aŭtoro kaj/aŭ la eldonisto de la libro. Ni planas atingi tiun permeson kaj eble iam ni povos publikigi tiun alportaĵon nian al la havaĵo da libroj en Esperanto.

Krom la instruado pri la Internacia Lingvo, estas ankaŭ grava tasko de ĉiuj esperantistaj rondoj la propagando, destine al la ĝenerala publiko, pri Esperanto. Ĉi-rilate, sendube la interreta blogo estas potenca propagandilo sed ĝi havas ian limon: ĝi alvenas nur al tiuj kiuj iniciatas serĉadon pri la afero. Alitipaj propagand-medioj kiel la presaro, radio, televido... kapablas atingi publikon kiu, eĉ se malpli ampleksa, ne iniciatis kaj eĉ ne apriore konis pri la afero. Ĉi-kaze la limo estas ke la uzado de tiuj medioj ne dependas de nia volo sed de la eblecoj kiuj, de tempo al tempo, prezentiĝas al ni.

Lasttempe nia E-Asocio ĝuis iujn el tiaj eblecoj. La urba ĵurnalo El Comercio, publikigis intervjuon kiun faris al ni

Aida Álvarez. Ĝi estis publikigita la 3an de majo de la nuna jaro.
Krom tio, Consuelo Carrasco, de la Televido de la Asturia Princlando rendevujs nian Prezidanto Carlos E. Carleos Artime kiu raportis pri Esperanto kaj nia agado favore al ĝi.
Pri ambaŭ intervjuoj ni pli amplekse informas pere de la 4a numero de nia **AEA-Informilo**.
Fine ni informas pri alia grava evento por nia Astura Esperantista Asocio.
Kiel sciate, nia E-rondo estas enkadrigita en la "Katedro Jovellanos pri Universitata Disvastigado".
Inter la profitoj kiuj tiu aparteneco al la Universitata strikturo alportis al nia Asocio estis la fakto kiu tiu institucio provizis al ni lokon por la disvolvigo de nia agado. Fakte, ni daŭre disponis, ekde la jaro 1977, kiam ni enkadriĝis en la Katedro, la saman ejon kiun ni havis ĝis tiam ekde la jaro 1953 kiam nia E-Grupo, sub alia nomo, estis enkadrigita en la tiam instituita Ateneo Jovellanos.
Pro necesaj reformoj en tiu konstruaĵo, en monato junio de la nuna jaro, post la finiĝo de ĉiuj kursoj en la Domo de la Katedro, oni plenumis la antaŭe planitan translokigon de ĉiuj dependaĵoj, inter ili nia Esperanto-Grupo, el tiu centro al alia konstruaĵo kiu trovigas tre proksima, konkrete, la antikva "Lernejo pri Komerco", poste nomata "Lernejo Jovellanos pri Entreprenaj Studoj", en la numero 1 de la strato Tomás y Valiente.
En tiu nova loko oni disponigis al ni bone situitan ejon, multe pli ampleksa ol la antaŭa kaj tre taŭga por niaj laboroj de esperanto-instruado, kunsidoj… La sola bedaŭrindaĵo estas tio ke tiu ejo troviĝas en la plej alta etaĝo en konstruaĵo kie ne estas lifto…



**Konstruaĵo kie troviĝas la nova sidejo de nia E-Asocio.**

Espereble, tiu nova ejo estos la loko de plia laborado favore al la Internacia Lingvo en nia urbo.
Inter la planita agado por la nova lernokurso estas nova Baza Kurso de Esperanto, eble ekde monato oktobro koincidante kun la eldono de ĉi tiu numero de la revuo. Se estus gelernantoj interesitaj pri pli altgrada kurso ni povus organizi ankaŭ Progresigan Kurson.
Tamen ni devas rekoni ke ne rezultus al nia facile la plenumadon de tiom da laboro. Ne abundas la aktivuloj en nia rondo. Tio estas speciale memorinda kiam alproksimiĝas la jaro 2009, Centjaro de nia Asocio. Por inde festi tiun 100-jaran datrevenon ni devus organizi iajn aktojn, ĉu eble landan Kongreson de Esperanto? Tio ŝajnas tro ambicia por niaj fortoj. Trafa signo de la malrapida progreso de Esperanto estas tio ke, post 100 jaroj, malgranda buso povas porti ĉiujn membrojn de nia urba E-rondo.



## Ĉu alianco de civilizacioj aŭ intercivilizacia milito

# Problemoj de la paco kaj la milito



**Ŝajnas ke la 21a jarcento, en kies sepa jaro ni troviĝas, tiel estos malpaca kiel estis la antaŭa. Laŭlonge de la 20a jarcento okazis multaj konfliktoj en la mondo: militoj de nacia liberigado kontraŭ la koloniismaj potencoj, civilaj militoj, revolucioj, lokaj aŭ zonaj militoj kiel tiuj de Mezoriento… Sed de milita vidpunkto tiu jarcento karakteriĝis pro la interfrontiĝo inter la grandaj potencoj: ambaŭ MondMilitoj kaj la t.n. Malvarma Milito.**

**Se la Unua MondMilito estis konflikto inter la grandaj koloniismaj potencoj, kiuj batalis por la kontrolo de la ĉefaj riĉfontoj de la planedo, la Dua, krom pli da la samo havis ankaŭ ian karakteron de interrasa alfrontiĝo, almenaŭ tiele estis interpretita de iuj el la batalantoj.**

**Sed vere ekster-tipa estis la Malvarma Milito, kaj tio pro pluraj kialoj. Unue, pro tio ke ĝi ne konsistis el militaj bataloj inter la ĉefaj protagonistoj: la grandaj potencoj Usono kaj Sovetio, sed lokaj periferiaj militoj fare de ŝtatoj klientoj: Koreujo, Vietnamio… Kaj due, kaj ĉefe, pro tio ke en tiu interfrontiĝo tre grava komponaĵo estis la ideologio. La kontraŭfrontiĝo de du sistemoj: kapitaismo kontraŭ socialismo, estis ekonomia batalado kiu solviĝis favore al la sistemo pli forta de ekonomia vidpunkto, tamen ĝi estis ankaŭ ideologia interfrontiĝo kaj tiurilate la solvo ne tiom estas klara. Ni devas atenti pri tiu aspekto ĉar ĝi tre rilatas kun la problemaro kiu prezentiĝas al nia mondo ekde la komenciĝo de la nuna jarcento.**

**La socialisma alternativo al la sistemo distingiĝis pro ties ideologia, etika enhavo. Tiu movado, preter la konkretaj spertoj de ĝia aplikado, kiuj ne altiris la apogon nek la entuziasmon de la loĝantaro de la landoj kie ĝi estis aplikita, havis kaj daŭre havas sian internan ideon, iuj valoroj kiuj, fakte, estas la eterna revo de la homaro. La justeco, la egaleco, la frateco aŭ interhoma solidareco… Laŭmezure ke tiuj valoroj aŭ ideoj eniras en la homan menson perdas sencon ĉiutipaj militoj. La interhoma kunlaboro kaj la egaleca distribuo de ĉiuj mondaj riĉaĵoj inter ĉiuj nacioj kaj popoloj anstataŭas la konkurencon kiu estas la fonto de ĉiuj konfliktoj kaj generanto de malegaleco, maljusteco, perforto, malamo… Tiel vidite, la fiasko de politika kaj ekonomia sistemo bazita sur tiaj valoroj devus esti konsiderata kiel granda katastrofo de la homa historio. Tamen la afero estas iom pli komplika. La konstraŭstaro de la socialismo fare de la kapitalismaj potencoj alprenis, ankaŭ ĝi,**

ian ideologian enhavon kiu rilatis, ankaŭ ĝi, al ĉiamaj revoj kaj idealoj de la homaro. Konkrete, la kontraŭsocialisma propagando dum la jardekoj de la Malvarma Milito tre emfazis la defendon de la libereco, la demokratio… ĉar, jes ja, en la lokoj kie oni provis la socialisman ekonomion oni agadis dekomence je la defensivo malpliigante aŭ preskaŭ nuligante la politikajn kaj civitanajn rajtojn de la loĝantaro. Ekspliki kial okazis tia evoluado en tiu sistemo estus tasko kiu postulus tre ampleksan raportadon kaj kiu preterpasus la celon de ĉi skribaĵo. Nun ni konstatu nur ke tiu evoluo okazis kaj ke tio iome malfortigis la ideologian pozicion de la porsocialismaj fortoj.

Hodiaŭ, preskaŭ du jardekoj post la disfalo de la komunistaj reĝimoj, oni povas aserti ke la popoloj de tiuj landoj estis vere trompitaj. La demokratio kaj la libereco, pri kiuj tiom emfazis iam la porkapitalisma propagando, daŭre mankas en tiu geografia zono, aŭ estas nur formalaĵo, kiel okazas, cetere, ankaŭ en la landoj de la ĉiama kapitalista mondo. Sed dume, la konkeraĵoj de la socialismo pri egaleco, socia protekto, laboro, edukado kaj saneco por ĉiuj… draste malaperis el la horizonto de la ĉiutaga vivo de la civitanoj de tiuj landoj. Tio estas, la kapitalismo, eĉ formoj je sovaĝa kapitalismo, estis forte starigitaj en tiu socio. La historia leciono kiun oni povas eltiri el tiuj okazintaĵoj estas tio ke kio vere gravas por la superregantoj de la mondo estas le ekonomia profito, ne la ideoj pri libereco kaj demokratio. Ĉi tiuj estas nur ideologia materialo por trompi la popolojn. Tiu instruo estas grava ankaŭ por privalorigi la nunan situacion.

Nun la milit-danĝero ne estas afero de ebla interfrontiĝo inter kapitalistaj ŝtatoj; la kapitalisma sistemo estas sufiĉe bone starigita, stabila, sub la lidereco de Usono. Ankaŭ ne estas forta(j) ŝtato(j) kun rasisma ideologio, kiel la naziismo de la pasinta jarcento. Kaj, kiel ni vidis, la interfrontiĝo inter grandaj sistemoj kun malsama sociekonomia strukturo definitive finiĝis per la venko de la kapitalismo. La supervivantaj socialistaj reĝimoj: Ĉinio, Kubo, Vietnamio, Koreujo… ne batalas hodiaŭ por renversigi la sistemon; ilia sola celo estas plibonigi sian ekonomian situacion, eĉ ene de la koordinatoj kaj en la kadro de la tutmonda kapitalista sistemo.

Nun multaj indicoj ŝajnas montri ke la estontaj militoj estos kontraŭfrontiĝo inter civilizacioj. Mondskale estas iu dominanta civilizacio, konata kiel "Okcidenta" civilizacio, kiu atingis la plej altan gradon je ekonomia kaj scienc-teknika disvolviĝo ĝis nun konata, kaj kies teritoria medio estas Eŭropo kaj Ameriko . Iu el la distingigaj elementoj de ĉiu civilizacio, la religio, ĉi kaze estas la Kristanismo en ties diversaj variantoj sed en procezo de retroiro, almenaŭ en kio koncernas al la influo de la eklezioj. Sed tiun elementon la Okcidenta civilizacio kunhavas kun aliaj, Centra kaj Suda Afriko, Sudameriko… Tie aliaj lokaj civilizacioj, aŭ ties restaĵoj, kunhavas la teritorion kaj la religion kun la dominanta kaj disvatiĝanta Okcidenta, Eŭrop-devena civilizacio. Aliaj elementoj, kiel la menciita scienc-teknika disvolviĝo, estas imitata, celata, de ĉiuj ceteraj kulturoj en la mondo. Ĉiukaze, la povo kiun provizas tiun scienc-teknikan potencon influas, efikas, por bono aŭ por malbono, sur la loĝantaro de la tuta planedo.

La alte industriigita produktad-aparataro de tiu dominanta kulturo funkcias per nafto-devenaj karburaĵoj. La nafto, neregule disformiĝinta surtere en la terglobo, fariĝis, ekde antaŭ pli ol unu jarcento, grand-valora varo avide celata de ĉiuj industriaj potencoj. La kontrolo de tiu riĉ-fonto estis iu el la ĉefaj kialoj de la militaj konfliktoj de la lasta jarcento inkluzive la du menciitaj mondmilitoj. En la nuntempo, en la areo de la dominanta civilizacio troviĝas la landoj plej potencaj de militista vidpunkto, kaj, kiel vidite, la filozofio reganta (ĉi)tie estas la kapitalismo, t.e. la emo eltiri, per konkurado, la plej grandan profiton kaj ĝui la plej altan havaĵon kaj viv-nivelon eĉ super la mizero kaj ruiniĝo de aliaj popoloj. Klare parolante, la imperiisma(j) potenco(j) intervenas permilite en ĉiu ajn modparto kie riskus, por ili, la kontrolo de la ekzistanta nafto.

Tia situacio estas konstanta konflikto-fonto, sed nun la kontraŭfrontiĝo alprenas formon de intercivilizacia batalado. Ĝenerale, ĝis nun ne estas en la mondo granda kontraŭstaro kontraŭ la valoroj kaj la kulturo de la dominanta Okcidenta civilizacio. Estas, jes ja, rezisto kontraŭ la rabemo kaj ekspluatemo de la militista imperiismo, sed ne rifuzo de la kulturo kaj valoroj de la koncerna civilizacio. Sed kun iu grava, tre grava, escepto. Temas pri la muzulmana aŭ Islama civilizacio, kies teritoria medio estas norda Afriko, Meza Oriento, Ŭesta Azio…. Jes, tiuj titoloj aludas al la religia karaktero de la popoloj de tiu terzono, la Mahometismo en ties diversaj variantoj. Ĉar ŝajnas ke ĉi tie ni troviĝas antaŭ ia renaskiĝo de religia kulturo kiu, dum kelkaj jarcentoj, restis en situacio de stagniĝo, senmoviĝo, marasmo…


**La opono de tiu kulturo al Okcidento manifestiĝas eĉ per perforto, ĉefe terorisma perforto. La peraviadila atako al la novjorkaj ĝemelaj turoj inaŭguris terorisman stilon de amasa mortigado kun serio da similaj atakoj en diversaj lokoj en la mondo, inter ili Hispanio. Militdanĝera streĉiteco, kiam ne fakta milito, troviĝas en la periferio de tiu muzulmana zono tralime kun la teritorio de alikulturaj popoloj, ĉefe kolizie kun la Okcidenta civilizacio aŭ mondpartoj pli malpli influitaj de tiu kulturo: Turkujo. Israelo/Palestinio, Afganio, Sudan-Sudo… Al tiu ekstera milit-fronto oni devas aldoni ankaŭ tion kion oni povus nomi la internan fronton kontraŭ la okcidenta kulturo: la terorisma perforto de la islama integrismo kontraŭ personoj de la sama muzulmana socio sed kiuj, iamaniere, reprezentas aspektojn de la Okcidenta kulturo: intelektuloj, feministinoj… (Argelio), aŭ kopto-kristanoj (Egiptujo, Sirio…). Kaj fine estas ankaŭ la perforto, ankaŭ terorisma, inter la diversaj mahometismaj variantoj: ŝijaismo kontraŭ sunaismo en Irako, perforto kontraŭ la kurdoj en tiu sama lando kaj ankaŭ en Turkujo, islama fundamentalismo en Afganio… En iuj politikaj medioj oni kutime uzas la esprimon: "alianco de civilizacioj". La registrar-prezidento de nia lando foje esprimas tiun koncepton kiel opono al tiu de "intercivilizacia militado". Verdire, tiu kontraŭdiro estas nur ŝajna; se oni emfazas pri la alianco de civilizacioj estas ĝuste pro tio ke la danĝero de milito inter civilizacioj estas tre reala kaj oni intencas kvazaŭ ekzorci ĝin. Fakte, ŝajnas ke la formulo "alianco de civilizacioj" estis esprimita unuafoje en Iranio (Persujo) fare de iu el la politikistoj de tiu lando, kaj paradokse nun ĝuste el tiu lando venas signoj de militdanĝero pro la tiea disvolvigado de nuklea armilaro. Cetere ankaŭ ne mankas la minacoj kiuj, de tempo al tempo, faras diversaj lideroj de Islama Jiĥad kaj aliaj teroristaj organizaĵoj dirante ke la muzulmana mondo ne rezignis pri la perdo de *Al Andalus* kaj emas reakiri ĝin. *Al Andalus* ne estas nur la hispana regiono nun nomata Andaluzio sed tuta Hispanio kaj Portugalio.**

**Oni povas interpreti, kaj fakte oni interpretas, tiun konflikton laŭ du malsamaj skemoj. Laŭ la unua el ili, temus nur pri alia, kroma, batalado por la kontrolo de la nafto-fontoj. Ne mankas argumentoj favore al tiu tezo: la usona agreso kontraŭ Irakio, la usona apogo al la secesia regiono en la nafto-hava zono en la sudo de Sudano… Laŭ la alia vidpukto tre gravas la distingigaj kulturaj elementoj de ambaŭ civilizacioj, inter ili, ĉefe, la religiaj diferencoj. Ankaŭ estas argumentoj kiuj apogas tiun interpreton: ne estas hazardo tio ke en la muzulmana mondo oni nomas "kruc-kavaliroj" la soldatojn de la armeoj kiuj batalas en Irakio, Afganio kaj aliaj lokoj, aludante al la interfrontiĝo, dum Mezepoko, de la eŭropaj kruckavaliroj kontraŭ la muzulmanaj regnoj.**

**En la sekvaj paĝoj oni montras specimenojn de ambaŭ pozicioj aŭ interpretoj. La artikolo de Arcadi Oliveres pliakcentas la gravecon de la nafto-problemo kiel milito-instigilo; laŭ tiutipa interpretado de la homaj konfliktoj, estas la ekomiaj interesoj de la superregantaj klasoj kaj ties militista povo la kaŭzantoj de la militaj agresoj. La artikolo meritas ke oni tralegu ĝin kun atento. Ankaŭ estas interesa tiu eseo verkita de Xavier Pikaza. Li pli atentas pri la interreligia maltoleremo, kiu estas la fonto kaj instigilo de de ĉiuj kruc-militiroj. Lia teksto, publikigata en ĉi tiu revuo pristudas la naskiĝon de nia Okcidenta kulturo, ties ligon kun la kristana religio kaj la formiĝon de la perforto kontraŭ la religiaj disidentoj kaj la malsamaj religia kulturoj de aliaj popoloj.**

**Ne estas la celo de ĉi skribaĵo deklari la pravecon de unu aŭ la alia interpreto, kio devas esti la konkludo de ĉiu leganto de ĉi tiu kaj alia materialo pri la temo. Sed oni povas indiki ĉi tie ke ne estas nepra kontraŭdiro inter ambaŭ vidpunktoj. La fakto ke la mastroj de ambaŭ interfrontiĝantaj blokoj solvas permilite siajn ekonomiajn kontraŭdirojn ne nuligas la realaĵon ke la amasoj moviĝas aŭ estas movataj de la identiĝo kun la propra kulturo por batali kontraŭ la malamikoj apartenantaj al alia civilizacio. Fakte, io simila okazis jam okaze de la menciitaj mezepokaj Kruc-militoj.**

**Rilate al tiu ĉi temo de milit-danĝero inter civilizacioj ni inkludas en ĉi numero de la revuo kroman tekston kiu prilumigas alian flankon de la problemo. Temas pri recenzo de iu libro, eldonita antaŭ tri jarojn, kiu temas pri la terorismo de la islama integrismo. Ĝi titoliĝas JIĤAD kaj pristudas la financad-manierojn de la teroristaj organizaĵoj en la kadro de la tutmonda ekonomio. En nia prezentado de tiu verko ni iome profundigas en la penson de ties aŭtorino. Ankaŭ la legado de tiu teksto kaj de la libro mem estas interesa por pli kompleta kono de la problemaro de la paco kaj la milito en nia epoko. Sed ĉiu el tiuj teoriaj alportaĵoj estas nur flanka kaj supraĵa rigardo al la problemo. Ĉiu problemo devas estis esti studata ne nur flanke kaj supraĵe sed de ĉiu flanko kaj angulo kaj ankaŭ profunde. Tio postulas menson malfermitan al ĉiuj, diversaj kaj divers-devenaj alportaĵoj, versioj kaj interpretoj. En la sekvaj paĝoj, jen nia modesta kontribuo al tiu informado.**



# PORMILITAJ ELSPEZOJ KAJ ARMILAR-INDUSTRIO

Verkis**: Arcadi Oliveres**
***Profesoro pri Ekonomio en la Aŭtonoma Universitato de Barcelono***

Ĉiu milito okazigas viktimojn. Ĉiu milito postlasas plenruinan fonon por ĉiu ajn lando. Neniu deziras malkaŝe la militon, sed dum la lastaj jaroj, pli ol tridek landoj estis en militoj –iuj ne deklaritaj kaj aliaj subtenataj de antaŭ kelkaj jaroj- kaj la elspezo dediĉita al armiloj atingis kvanton je proksimume biliono da dolaroj ĉiujare. Ĉiu milito havas sian kuntekston kaj, kvankam iufoje la kaŭzo de la konflikto rilatas al la teritorio aŭ al la politiko, la historio instruas nin pri tio ke plejparto el la militoj enkaŝas ekonomiajn interesojn.

Travidante la lastajn konfliktojn oni povas konstati ke la nafto estas potenca milito-naska faktoro, ĉar la kontrolo de iu el la plej uzataj energioj provizas hegemonian povon al tiu, kiu fariĝas ĝia mastro.

La milito kontraŭ Afganio estis pravigita per la okazaĵoj de la 11a de septembro de la jaro 2001 en Novjorko -kun la atako al la ĝemelaj turojcelante puni la talibanojn, pretendante liberigi landon submetitan al reĝimo kiu devigas la virinojn survesti ***burkon*** kaj kiu permesadis tre intensan trafikadon je heroino. Kelkjare post la konflikto, la situacio de la virinoj apenaŭ pliboniĝis kaj la heroino-trafikado tre multe pligrandiĝis, sed aperis iu novaĵo: oni konstruis naftodukton por enkonduki la novajn nafto-ĉerpitaĵojn de la Kaspia maro, tra la Hinda Oceano, al Usono. Oni mendis ĝian konstruadon al la usona entrepreno ***Halliburton***, kiu estis gvidita de Dick Cheney, usona Vicprezidento. Simila antaŭaĵo estis jam en la unua milito kontraŭ Sadam, kiam, pretendante restarigi la suverenecon de Kuvajtio, Usono invadis Irakon.

Se ni analizas la multan militojn en Afriko, evidentiĝas ke multaj el ili estas tre interligitaj kun la posta komenciĝo de eltirado de naturaj rimedoj. Ekzemploj kiel tiuj de Kongo aŭ Angolo, kie la inter-tribaj militoj koincidas kun la alveno de multnaciaj entreprenoj kiuj instaliĝas en tiuj landoj por la komenco de la operacioj, pravigas ĉies suspektadon.

Kiuj ajn estu la realaj kialoj kaŝitaj malantaŭ ĉiu ajn milita konflikto, la militoj ekzistas kaj la interfrontiĝoj ripetiĝas. Kaj por ke la militoj eblu estas necese krei kompletan armil-konstruan industrion. Iu milito tiom estas perversa pro la ago mem kiu ĝin konstituas kiom pro la tuta antaŭa prepariĝo necesa por tio. Se estas iu meĥanismo kiu igas ke mono, personoj, esplorado kaj transporto estu metitaj serve de la milito, oni povas diri ke la militoj estas antaŭ-kalkulitaj kaj preparitaj. Se ne ekzistus la armeoj, malfacile povus okazi militoj kaj eble pli oftus la dialogado. Estas tuta meĥanismo kiu igas ke, en la momento kiam estiĝas fajrero, granda maŝinaro de rimedoj ekfunkcias. La militoj ekzistas kaj pludaŭras dank´al iu ampleksa entrepreno nomata “planado”, konstituita de kvin elementoj: la budĝeta konto destinita al la armilaro, la ekzistado de armeoj, la scienca esplorado kun militistaj celoj, la armilar-industrio kaj la armilar-komercado.

La militista elspezado ekzistas tial ke ĉiujare, kiam la diversaj parlamentoj el la mondo aprobas tion nomata ŝtataj budĝetoj, estas iu mon-konto kiun oni asignas al iu konkreta ministrejo, la Ministrejo pri Defendo, kiu estas konsiderata same ol ĉiu ajn alia ŝtata fako. Se oni demandus al iu parlamentan(in)o ĉu li/ŝi konsentas pagi iun militon, sendube la respondo estus ke la militoj devus ne ekzisti; sed se al la sama parlamentan (in)o oni demandus kial li/ŝi aprobas budĝeton en kiu estas konto dediĉita al la Ministrejo pri Defendo, eble la respondo estus ke la aprobo estas pro tio ke, unue, tiel estis ordonita de sia partio, kaj due, ĉar temas pri mono kiu devas pagi ensemblon da elspezoj kiuj rilatas al iu industrio kaj iuj rimedoj destinitaj teni la lando preparita antaŭ eblaj minacoj.

Sed oni devas prikonsideri iun fakton. Kaj estas tio ke, dum kvardek jaroj, tiu minaco, por Hispanio, por Eŭropo aŭ por Usono havis konkretan nomon kiu estis Sovetunio. En la jaro 1991, kun la malapero de la socialismaj respublikoj, la minaco malaperas sed kurioze ne okazas same al la

militistaj budĝetoj destinitaj al la defendo kontraŭ tiu ebla invadanto. Se la mono estas destinata al iu malamiko kaj la malamiko malaperas, estus logike vidi ke la sekvan jaron la budĝeta konto malaperas aŭ estas draste malgrandigita. Sed neniu lando el la NATO reduktis sian budĝeton. La tutmonda militista elspezado rimarkeble malgrandiĝis, sed okazis tio ĝuste tial ke faris tiun reduktadon la OrientEŭropaj landoj, pro la malapero de la **Varsovia Kontrakto**.

Se la argumento de la minaco ne estas verŝajna, estas pro tio ke la plutenado de la militistaj elspezoj havas aliajn kialojn. La unua, la inercio mem: tio estas, kiam iu ministro pri defendo prisupozas, kalkulas, kiun budĝeton li bezonas por la sekva jaro, eble li ne pensas pri la ekzistantaj malamikoj aŭ kiuj armilar-modeloj li bezonas por la defendado kontraŭ tiuj pri-supozataj malamikoj; plej eble li dediĉiĝus al la konsultado de la budĝeto de la antaŭa jaro, taksado de la inflacio de la kuranta jaro kaj kalkuli kioma devas esti la fina konto por la sekva jaro cele ne perdi aĉet-kapablon. Alia elemento estas la teknologia renoviĝo. Okazas ke la fabrikoj de armilaro, samkiel tiuj de aŭtomobiloj aŭ de vestaĵoj, ĉiujare organizas eksponojn de siaj produktaĵoj en kiuj ili elmontras ĉiujn novaĵojn pri misiloj, tankoj aŭ aviadiloj –la plej gravaj el ili okazas en Usono, Anglujo, Francio kaj Singapuro- kaj kie la diversaj ministroj pri defendo aŭ stabestroj aŭ altrangaj generaloj ĉeestas por serĉi kaj aĉeti, kvazaŭ temus pri bazaro, celante la plibonigon de la arsenalo kiun ili povas posedi.

Alia elemento estas la enorma influo kiun, ene de la registaroj, havas la perantoj de la armilar-industrioj. La iama usona prezidento, Eisenhower, difinis la lobion (prem-grupo) de la armilar-industriistoj sur la registaroj kiel "militista industria komplekso", konceptante ĝin kiel iu reto de interesoj en kiu partoprenas fabrikistoj, armilar-komercistoj, universiotataj esploristoj, perantoj de Ministrejo pri Defendo aŭ ĵurnalistoj, kiuj konstituas iun gravan premilon. Oni konstatis ke trideko da usonaj parlamentanoj asignitaj al la komisionoj pri defendo de la Parlamentejo kaj la Senato havas duoblan salajron: tiu kiu koncernas al ili kiel parlamentanoj kaj tiu kiun ili ricevas kaŝece de iu el la ĉefaj usonaj armilar-industrioj. Fakte, se oni serĉas la nomojn de la altaj gvidantoj de la usonaj armilar-industrioj, ofte ili koincidas kun antikvaj stabestroj aŭ antikvaj sekretarioj de defendo.

La nivelo de la tutmonda militista elspezo estas terura: en la jaro 2003, la elspezo atingis la kvanton de biliono da dolaroj, ioma sumo dudekobla ol tiu necesa por elradikigi la malsaton el la mondo. En la hispana ŝtato, la militista elspezo de tiu jaro estis 43 milionoj da eŭroj ĉiutage. Iu kvanto kiu ŝajnas sufiĉe ampleksa por prikonsideri kiel insulto la argumentojn de la Ministrejo pri Defendo kiam, kraŝis aviadilo transportanta 52 soldatojn, konsideris ke la kaŭzoj de tio estis la manko de budĝeto por aĉeti pli kvalitajn aviadilojn.

Fakte, oni kamuflas duonon el tiuj elspezoj en aliaj ministrejoj, ago kiu eĉ estis denuncita de la NATO, kiu ne povas kontroli la ĝeneralan elspezon sen la realaj konto-registroj de ĉiu lando. Kaj okazas ke la hispana ŝtato partoprenas en la konstruado de iu eŭropa batal-aviadilo kune kun aliaj landoj por la kreado de iu eŭro-armeo, projekto kun elspezoj kiujn oni ne konto-registras en la sekcio pri Defendo sed en tiuj pri Industrio kaj Teknologio.

Alia elemento kiu helpas prepari la militon estas la soldatoj, la ekzistado de armeoj. La UNO kalkulas ke estas 26 milionoj da militistoj el diversaj rangoj en la mondo. En tiu statistiko ne estas enkalkulitaj la kvazaŭ-militistoj, nek la policistoj, nur la profesiaj militistoj. Grandparto el la argumentoj kiuj pravigas la konstantan ekzistadon de la armeoj ne nur temas pri la ebla defendo antaŭ malamiko, sed pri gravaj hom-favoraj "taskoj".

Iu dosiero de la UNO asertis ke por tiuj hom-favoraj "funkcioj" estus necesaj nur inter 400.000 kaj 500.000 soldatoj. Armeo, kiu, aliflanke, oni konsideris devus esti komandita de la UNO mem por eviti ke ĉiu nacia armeo agadu senkunordige kaj laŭ siaj interesoj. Tial do, la armeoj estas troampleksaj kaj la eksceso efikas nur por generi eblecojn je atako kaj minaco kiam ili eĉ ne ekzistas.

Kiam la hispana armeo estis varbita laŭ kontingento, ĝi konsistis el 250.000 personoj. Kun la profesiigo la kvanto estis fiksita en 170.000 (ne atingita per la volontularo). Se ni demandas al iu responsulo de la Ministrejo pri defendo pri la neceso disponi je armeo, la respondo kutime estas: por plenumi hom-favorajn taskojn. Se la afero vere estus tiele, oni devas scii ke dum la lastaj dek jaroj, la armeo sendis al la konflikto-zonoj entute 20.000 personojn por tiuj taskoj. Se tiaj estas la realaj necesoj kiuj pravigas la ekzistadon de la hispana armeo, kio okazas kun la ceteraj 150.000 militistoj? En Hispanio estas 50.000 oficiroj profesiaj, supozeble kun deziro praktiki sian profesion. Por praktiki la profesion

ili bezonas soldatojn kiujn ili devus gvidi kaj teni sub sia hierarkio. Iu oficiro ne konsideras sin oficiro se li ne havas almenaŭ du soldatojn kiuj obeus lin, kaj tio postulas la ekzistadon de pliaj 100.000 personoj en la armeo. Tiel ni havas jam la ceterajn 150.000 personojn.
Sed se oni analizas la famajn "hom-favorajn taskojn", oni konstatas ankaŭ ke la intervenoj de la hispana armeo plej ĝuste estis katastrofaj. Dum la konflikto de Kosovo, la hispanaj militistoj entreprenis la taskon konstrui Kampadejon de rifuĝintoj en la duaranga albana urbo, Durreso, kampanjo kiu estis efektivigita kun granda propaganda aktivado por reliefigi la solidarecan laboron kiun estis plenumante la armeo per tiu konstruado. La kampadejo kiun konstruis la hispana armeo riceveblis 5.000 personojn kaj kostis 7.000 milionojn da pesetoj. Proksime de tiu loko, la organizaĵo ***Cáritas*** muntis kampadejon de rifuĝintoj por 2.000 personoj, sed laŭ kosto proporcie multe pli malalta: 200 milionoj da pesetoj. Tio signifas ke 500 milionoj estus sufiĉaj por la hispana armeo. Poste oni eksciis ke la soldatoj kiuj estis konstruintaj la kampadejon de rifuĝintoj de Albanio ricevis 700.000 pesetojn ĉiumonate –kaj la oficiroj pli ol unu milionon- pro ilia agado en "danĝera situacio". Evidentiĝas ke se la elspezoj de tiu hipoteza helpo pli estas dediĉataj al la salajroj ol al la helpo mem, ni povas demandi al ni ĉu reale ni povas paroli pri "helpo" kaj ne estus prefere ke tiuj taskoj estu plenumataj de specialigitaj homfavoraj organizajoĵ.
La afero de la militista esplorado meritas specialan atenton, ĉar ĝi estas pli bone akceptata ol ĝi meritas, tial ke la kialoj kiujn oni diras pri la konveneco de tiutipa esplorado pli estas ŝajnaj ol realaj. Ĉirkaŭ la militista scienc-esplorado estas mito kiun oni devas refuti sed kiu tre estas enradikigita, kaj estas tiu kiu diras ke la sciencesplorado pri militistaj temoj estas aplikebla en la civila vivo kaj ke, kvankam ĝi ne estus utiligata por militistaj celoj, ĉiam estas favora por la ĝenerala scienca progreso. Celante pravigi tiun transigon de la kono, oni prezentas al ni iujn ekzemplojn: la laser-radio aŭ la transistoro estas du el la militistaj eltrovoj aplikataj al la civila vivo. La kazo de la Interreto estas iomete malsimila: ĝi estas iu civila eltrovo, disvolvigita de militistoj kaj poste denove aplikita al la civila vivo. Kaj la germana aviado dum la Dua Mond-Milito atingis iujn progresojn en la perfektigado de la flugado kiuj poste estis aplikitaj en la civila aviado.
Sed la afero estas tio ke, proporcie, la konotransigo por la civila vivo pli ĝuste estas ridinda se oni prikonsideras la tutan militistan esploradon kiun oni efektivigas. Tial, la alporto kiun povas fari la militista esplorado al la scienca progreso tiom estas malgranda ke preferindas dediĉi pli da mono rekte al la civila esplorado sen-necese pasi tra la militista filtro.
Estas historiaj ekzemploj kiuj pruvas tion. Finiĝinte la Dua MondMilito, iuj el la venkitaj landoj, kiel Germanio kaj Japanio, estis kondamnitaj, fare de la aliancanoj, ne dediĉi pli ol 1 procento de ilia NIP (Neta Industria Produktado) al militistaj elspezoj, kiel kontrol-rimedo por limigi ilian milit-kapablon. La trudita limo por la milit-ista elspezo igis ke la klopodoj estis aldirektitaj al aliaj terenoj kaj, en la tereno de la scienc-esplorado, kompreneble, oni dediĉis ilin al la civila sfero. Kun la pasado de la jaroj, Germanio kaj Japanio disvolvigis du el la plej konkur-kapablaj industrioj en la mondo.
Aliflanke la militista esplorado alvenis al rezultoj tre perversaj kaj dediĉis parton el la mono al la renovigado de nemortigaj armiloj, kiuj estas tiuj kiuj, anstataŭ okazigi grandan kvanton da mortintoj, okazigas grandan nombron da vunditoj, ĉar oni pli domaĝas la malamikon kiam vundas lin ol kiam mortigas lin, kaj devigas lin atenti pri parto el la loĝantaro bezonanta konstantan flegadon. Tiutipaj armiloj estis tre priesplorataj fare de la usona armeo, kiu eĉ ellaboris artefaktoj kapablaj pafi laser-radiojn por okazigi kronikan blindecon aŭ bombojn de bruo por okazigi surdecon.
En la hispana kazo, la oficialaj statistikoj diras ke 35 procento el la publika mono dediĉita al la esplorado estas destinata al la militista esplorado. Tio signifas 220.000 milionoj da pesetoj ĉiujare. Tiu mono dividiĝas laŭ du procentoj: 20 procento kaj 80 procento. La unua koncernas al la parto de diversaj esploroj, por plibonigi parton de la arsenalo, de la veturiloj, de la eksplodigiloj, ktp. La alia procento, la 80 procento estas dediĉata al unusola projekto kiun oni disvolvigas jam de antaŭ kelkaj jaroj kaj estas la tiel nomata ***Eurofighter***, la eŭropa batal-aviadilo. Tiu ĉi aviadilo estas konstruata kunlabore kun Germanio, Italio kaj GrandBritio, kvankam komence Germanio rifuzis partopreni en ĝi –ĉar konsideris ĝin tro multekosta projekto, malmulte evoluita de teknologia vidpunkto kaj destinita batali kontraŭ ne-ekzistanta malamiko, Sovetunio- sed fine eniris, supozeble premita de la priarmilara industrio. El la totala budĝeto, Britio

alportas 37 procenton, Germanio 33 procenton, Italio 17 pro-centon kaj Hispanio 13 procenton, kiu konstituas por la registaro tiun elspezon je 220.000 mili-onojn da pesetoj. Ĉi tiu porcio el la projekto konsistas en tio ke Hispanio fabrikadas la voston kaj la maldekstran flugilon de la aviad-ilo. Spite al la elspezoj kiun okazigas tiu ĉi pro-jekto, en la unuaj provoj kiujn oni faris la aviad-ilo falis, pruvante ke ĝi ne estis tre stabila.
Iu el la ĉefaj argumentoj ĝenerale uzita de tiuj kiuj opinias ke la pri-armilara industrio esta eti-ke negativa sed iamaniere necesa estas tiu pri la kreado de laborpostenoj. Se ni devas temi pri la laborpostenoj, sendube la armilar-industrio, ja, kreas ilin, sed ĉiukaze malpli kvante ol la kon-vencia industrio. Cent milionoj da pesetoj in-vestitaj en la armilar-industrio povas krei du la-bor-postenojn, dum en la kazo, ekzemple, de la fer-industrio, la sama investo povas krei dek labor-postenojn.
Estas du ĉefaj karakteraĵoj kiuj distingigas la armilar-komercadon. La unua rilatas al la roluloj de tiu ĉi transakcio, la Nordaj kaj la Sudaj lan-doj, kio signifas ian unuan dividon: la Nordaj aŭ riĉaj landoj kutime estas tiuj kiuj fabrikas kaj vendas armilojn, dum la Sudaj aŭ malriĉigitaj landoj kutime estas la aĉetantoj kaj, ĉefe, tiuj kiuj suferas la sekvojn. Estas interesa konstati ke, se temas pri drogo-komercado, la senco de la fluo estas la inversa: la drogo kiu ne estas ĥemi-aĵo estas produktata ĉefe en la landoj de la Sudo kaj la plej granda konsumado okazas en la Nor-daj landoj. La interrilato kiu ekzistas inter tiuj du transakcioj estas tio ke, fojfoje, se mankas la mono, la armiloj estas fine pagataj per drogo. La dua karakteraĵo de la armilar-komercado estas la netravidebleco de la operacio. La komercado de armiloj esence kaŝas du aferojn: Unuflanke, ĝi kaŝas la produkton de la transakcio, ĉar neniu produktanto ŝatas esti identigita principe kiel vendisto de armiloj, ĉar tio estas nepopulara. Ofte okazas duoblaj kaj separataj sendaĵoj, en kiuj, se ekzemple oni sendas batal-helikopteron, unue alvenas la helikoptero kvazaŭ ĝi estus apa-rato por civila uzado kaj, post iom da tempo, oni sendas pli diskretan pakaĵon kiu entenas la mal-grandan maŝinaron kiu devas esti kombinata kun la helikoptero por igi ĝin militista aparato. En ĉi tiu ne-travidebleco la dua afero kiun oni kaŝas estas la fina destino de la produkto, ĉar preskaŭ ĉiam temas pri militantaj landoj, kaj ne estas tre etika nek eleganta sendi armilojn al batalantaj landoj, ĉar foje eĉ estas malpermesate fari tion. Estas tiam kiam okazas la triangulaj operacioj, en kiuj oni uzas trian landon kiel peranto, kiel oficiala destino, ne deklarante la realan destinon. Dum la milito de Ruando, ekde Hispanio oni sendis armilar-kontingentojn, sed neniumomente oni diris ke temis pri armiloj por Ruando, ĉar la vendistoj subaĉetis iujn funkciulojn de la am-basadejo de Panamo por ke ili oficiale akreditu ke la armiloj iris destine al tiu lando, iu lando sen milito. Atinginte la permesojn, tuj post la eliro el la dogana haveno, anstataŭ adresiĝi al Ameriko, la armiloj iradis al Afriko.



***…la milito solvas nenion, sed pli ĝuste, ĝi ĉion komplikas.***

Antaŭ ĉi-tiu perspektivo, ĉu eblas ioma optim-ismo kaj espero? Same ol en la interrilatoj Nor-do-Sudo kaj la ekonomiaj politikoj, ankaŭ en la politikoj pri militarigo estas aro da eblaj alterna-tivoj kiuj senpravigas la argumentojn subtenan-tajn ke la militoj estas ne-eviteblaj kaj ke la in-dustrio kaj la esplorado kiujn ili generas estas profitdonaj. Estas traireblaj vojoj, sed dum ek-zistas militoj, plej urĝas ankaŭ gast-akcepti la viktimojn kaj la ekzilitojn, ne fermante al ili la landlimojn. Inter la alternativoj estas kvin vojoj: elekti la eblecon de la pacigado, senaktivigi la armilar-industrion, edukadi por la paco, apogi la pac(if)ismon, kaj praktiki konscienc-obĵetadon.
Por kontraŭstari la militon plej gravas elradikigi ĝin el la homa menso. Komprenante ke plej ofte la milito solvas nenion, sed pli ĝuste, ĝi ĉion komplikas. Kiam okaze de la unua milito kon-traŭ Sadam oni redonis la suverenecon al Ku-vajto, indas pripensi ĉu vere estis necese pagi ti-om altan prezon kiom reprezentas la nombro da morintoj en la konflikto kaj en la posta embargo al Irako, rezulte de kiu mortis pli ol miliono kaj duono da personoj dum la dek du jaroj kiujn ĝi daŭris. La oficiala interpretado asertas ke tiu es-tis “pura” kaj “rapida” milito. Rapida, jes ja, es-tis tiu milito, sed la viktimoj kiujn ĝi okazigis estas tute alia afero. Ĉar ofte okazas ke la sekvoj kaj rezultoj de iu milito estas pli malbonaj ol la konflikto mem.

Tial, la militoj ne nur solvas nenion, sed krome ĉiam estas eviteblaj; neniam oni povas paroli pri la lasta negocado. Eĉ se la milito estas jam komenciĝinta, ĝi ĉiam estas haltigebla. Taŭga ekzemplo pri tio estas la kazo de la Ulstero, kie post tiomjara konfliktado oni sukcesis pacigi tra negocad-vojo. Ekzemplo konsiderinda por similaj konfliktoj, kia tiu de ETA.



***Ofte okazas ke la sekvoj kaj rezultoj de iu milito estas pli malbonaj ol la konflikto mem.***

La dua elemento serĉante alternativajn vojojn estus draste malpliigi la nombrojn kiujn ĉiunivele movas la armilar-sektoro, komprenante ke se oni reduktas la sensacion pri "preparado" kaj planado" de milito, oni reduktas la eblecon je ekmilitado.

Sed, krom la reduktado de la pormilita elspezo, estas necese ankaŭ transiri de la militista scienesplorado al la civila. Generi novajn primilitajn esplorojn signifas elspezi multe da mono pri kiu oni ne scias ĉu oni eltiros el ĝi profiton, kaj se okazas tiel estos por la konstruado de pli da armiloj kaj, tial, por la generado de sensacio pri pli da milito kaj lonfliktoj. Tial, oni povus fari transigon de mono al la universitata esplorado profitdona por la tuta socio.

La edukado por la paco estas esenca, ĉefe antaŭ la konstanta "bombardado" da informo kiu prezentas al ni la perforton kiel "normaligitan" fakton kaj la militojn kiel "neevitebla" agado. La bildo kiun ofte prezentas al ni la informmedioj –ĉu realaj aŭ fikciaj- ampleksigas kaj grand(ioz)igas la ĉeeston de la perforto en la mondo, kiu ja ekzistas, sed pri kiu ni devas ne distri. La statistiko diras al ni ke, en Usono, 16/17jaraĝa knab(in)o kiu spektus televidon averaĝe du ho-rojn ĉiutage estus spektinta je tiu aĝo averaĝe 35.000 murdojn. Kaŭze de la prezentado de ĉiu-ĉi perforto, aperas infanoj kapablaj mortigi siajn lerno-kunulojn kvazaŭ temus pri ludo.

La pacfavoraj movadoj interrilatas nuntempe kun la movadoj favoraj al la konstruado de alitipa mondo. Movadoj kiuj postulas alimanieran funkciadon kaj kiuj denuncas la kruelaĵojn kiujn la militoj aŭ la restriktaj politikoj okazigas kontraŭ granda parto el la tutmonda loĝantaro. Sed mankas ankoraŭ grava agadparto kiu transiru de la denuncado al la reala ŝanĝigo, kaj tion oni atingas ofte kombinante edukadon kaj respondecon, pensante ke la ŝanĝoj, ec se malgrand-skale, povas esti atingitaj, sed kun ioma peno kaj kohero kaj, ĉefe, kun amasa apogo kiu devigus la landajn regantojn kaj potenculojn ŝanĝi la strategiojn.

Rilate al la konscienc-obĵetado, en la landoj, kiel la nia, kie malaperas la devigita soldat-servo, iĝas sensenca. Sed estas aliaj vojoj de obĵektado, kiel la scienca obĵetado, tio estas, la esploristoj kiuj rifuzas partopreni en la disvolvigado de projektoj kun militistaj celoj. Tia teniĝo estas malfacila ĉar plejparto el la personoj kiuj ĝin praktikas ĉesas ricevi monhelpon aŭ oni igas ilin perdi prestiĝon, sed kiel okazas en ĉiu ajn komenca batalo, nur la amasa apogo al tiu decido povas meti finon al la politikoj kiuj punas aŭ premias la civitanojn laŭ sia poziciiĝo.

Ankaŭ estas kazoj de labor-obĵetantoj: dum la milito de Irako, iuj laboristoj de la Transmediteranea ŝip-Entrepreno, dediĉita al la transportado de soldatoj al la zono de la konflikto, rifuzis labori tiucele kaj estis eksigitaj en la entrepreno. La fakto ke ekzistas personoj pretaj perdi sian laborpostenon pro ilia rifuzo partopreni en la mekanismo kiu stimulas la militojn povas esti konsiderata kiel triumfo.

Fine, la financa obĵetado estas alia persona agado de kohero kun la stimulo de la paco kaj la rifuzo de la milito, intencante koni al kiuj bankoj oni destinas la monon, por ne kunlabori en la financado de la armilar-aĉetado aŭ kun la pormilita industrio. La financa obĵetado havas ankaŭ la formon de fiska obĵetado kiam oni plenumas la Deklaracion de la enspez-imposto, rifuzante pagi, aŭ depostulante ĝin se ĝi estis antaŭ-retenita, la 6 procenton destinatan al militistaj elspezoj. Ankaŭ tiu ĉi formo alportas domaĝojn al tiuj kiuj ĝin realigas, kaj estas necesa, por ties aplikado, ke ĝi estu amasa je socia nivelo.



# Kristanismo kaj perforto en la historio de Okcidento

**Verkis**: Xavier Pikaza
***Doktoro pri Biblia Teologio, Filozofio kaj Filologio***

Por pli rekte centriĝi en la temo, ni situiĝu en la 13a jarcento, por studi kun Tomaso el Akvino la teologiajn pravigojn de la perforto: tiam Eŭropo aperas kiel kompakta kontinento, kun ties propra identeco, tiamaniere ke ĝi devas ekskludi kaj ekskludas elementojn kiuj staras kontraŭ ĝi. Mia-opinie tiu estis iu necesa momento de la disvolviĝo de Eŭropo, kvankam mi pensas ke tio iras kontraŭ la evangelia esenco de la kristanismo, kiu ne ekskludas sed inkludas, ne rifuzas sed akceptas la eblajn kontraŭulojn. En tiu ĉi momento de firmiĝo, kiam Eŭropo sin sentis forta kiel kristana, ĝi forpelis de sia sino la disidentojn kaj kontraŭulojn, por pli bone identigi sin mem.

Tiusence, almenaŭ en la katolika eklezio, ni daŭre vivadis ĝis la 20a jarcento (2a Vatikana Koncilio) ene de iuj mezepokaj koordinatoj. Sankta Tomaso supozas ke la fido estas iu libera akto, tiamaniere ke ĝi ne povas esti trudita. Sed, samtempe, ĝi havas ian socian enhavon kaj laŭ tio, en iu kunteksto de kristaneco, povas ia-maniere esti trudita perforte, tiel aperante kiel principo de perforto.

Ĉi tiu estas iu mezepoka doktrino, sed ĝi estis preskaŭ teologia regulilo kaj en la katolika vidpunkto de Eŭropo ĝis meze de la 20a jarcento (2a Vatikana Koncilio). Tiu doktrino antaŭsupozas ke la fido estas ia libera donaco kiun oni ne povas nek devas altrudi per la forto al la nekredantoj (ne kristanoj). Sed ĝi havas ankaŭ ian socian aspekton kaj tial la kristanoj povas uzi kaj multfoje uzis la forton ne nur por sin oponi al la persekutantoj de la kredantoj, sed ankaŭ por disvastigi la fidon kaj, ĉefe, por subteni ĝin, tie kie ekzistis risko je apostateco aŭ forlaso el ĝi.

Tiu ĉi vidpunkto esprimas la teologian identiĝon de Eŭropo, kiu baziĝas en la kristanismo, sed kiu strukturiĝas en iu kunteksto kie la religio fariĝis ia ***spirita povo*** kiu influas decidmaniere sur la ***politika povo***, eĉ se ambaŭ povoj ne plene kunfandiĝas.

Tiel oni skizas ian unuigan kaj hierarkian vidaĵon de la realaĵo, kie tiuj kiuj volas esti perantoj de la evangelio de Jesuo (Papo kaj episkopoj) prenis la spiritan povon kaj ekde la pinto superregas (aŭ volas superregi) la ceterajn povojn, dirante al la politikistoj-militistoj tion kion ili devas fari. Tiamaniere, la fido (kiu en si mem pretendas sin teni en ia mistika tereno, preter la ekstera perforto) fakte restis interne ligita al la politiko, realigante pere de ĝi egan perforton.

Supozeble tiamaniere la perantoj de la Eklezio (portantaj ian ***spiritan glavon***, tio estas, ian sakramentan povon) povas gvidi kaj gvidas, ekde supre, kun supera saĝeco, tiujn kiuj plenumas la politikan povon. Tiele la eklezia povo estas konceptata kiel glavo, tio estas, kiel praktikado de reala suvereneco, kapabla distingi (dividi) kaj puni la homojn ekde la spirita tereno, por tiele gvidi, ekde sia alteco, la portantojn de la politika-milita glavo.

La «spirita glavo» de la eklezio regas super la materia glavo de la reĝoj kaj la soldatoj, al kiuj ĝi devas provizi la normojn de ties agado, por ĉies bono (de la politikistoj kaj la soldatoj mem).

Ni havas, do, du glavojn, sed iun super la alia. La ***klerikoj***, perantoj de la Eklezio, ne povas batali per si mem, nek mortpuni iun ajn (kvankam multfoje faris tion). Tamen, ili povas fari ion pli grava: ili ne mortigas, sed diras kiujn oni devas mortigi favore al la fido; ili ne batalas (principe), sed diras kontraŭ kiuj oni povas kaj oni devas batali, proklamante krucmilitojn, kaj juĝante herezulojn, transdonante ilin al la sekulara brako, por ke ĉi tiu plenumu tion kion diras la eklezio, por ke tiu faru sianome la militojn kaj oni mortigu laŭ ĝia konsilo, la kontraŭulojn de la fido. Tiamaniere, la glavo de la perantoj de la fido, ne estante ĝi mem militista, gvidas la militistojn kaj la politikistojn, por ke ili metu sian perforton «serve de la fido». La Eklezio venis prezentiĝi kiel supera arbitracianto kiu difinas kaj gvidas ekde sia privilegio la disvolviĝon de la ceteraj planoj de la socio, la politika-milita kaj la ekonomia-labora, laŭ la mezepoka skemo de la tri povoj (klarikaro, nobelaro, laboristaro).

Laŭ principo, la kristana fido devas disvatiĝi sen ekstera perforto ĉar apartenas al la tereno de la

persona memdecido. Kaj tiele okazis ĝenerale dun la unuaj tri jarcentoj de la historio de la kristanismo, kiu devis vivi, sin teni, kaj disvastiĝi, en iuj leĝaj kaj politikaj cirkonstancoj malfavoraj. La unua misio de la kristanismo plenumiĝis "sen glavo", eĉ pli, subriske de la glavo de la romia imperio. La fido kaj glavo apartenas al malsamaj niveloj, ĉar temas pri malsamaj niveloj anstataŭ malsamaj povoj tial ke la evangelio ne povas esti interpretata kiel povo en la socia kaj politika signifo de la termino.

Sen glavo nek leĝo. La kristanoj kreas iun ordon je bonvolo, sen perforto (Epistolo al la romianoj ĉapitro 12, versaĵoj 9 al 21): ***9 Via amo estu sen hipokriteco. Abomenu tion, kio estas malbona; algluiĝu al la bona... 14 Benu tiujn, kiuj vin persekutas; benu, kaj ne malbenu. 15 Ĝoju kun ĝojantoj, ploru kun plorantoj. 18 Se estos eble, restu pacaj viaparte kun ĉiuj homoj. 19 Ne venĝu vin, amataj… 20 Sed se via malamiko malsatas, donu al li manĝi; se li soifas, donu al li trinki; ĉar tion farante, fajrajn karbojn vi kolektos sur lia kapo. 21 Ne venkiĝu de malbono, sed venku malbonon per bono.*** (Romianoj 12, 9-21)

La kristanoj vivas ene de politika sociordo (leĝa kaj ekonomia) difinita de iu leĝo kiu uzas la glavon.

***1 Ĉiu animo submetiĝu al la superaj aŭtoritatoj, ĉar ne ekzistas aŭtoritato, krom de Dio; kaj tiuj, kiuj ekzistas, estas starigitaj de Dio. 2 Tiu do, kiu kontraŭstaras al aŭtoritato, rezistas al la ordono de Dio; kaj tiuj, kiuj rezistas, ricevos juĝon. 3 Ĉar regantoj estas teruraĵo ne al la bona agado, sed al la malbona. Ĉu vi volas ne timi aŭtoritatulon? faru bonon, kaj vi havos de li laŭdon; 4 ĉar li estas servanto de Dio al vi por bono. Sed timu, se vi faras malbonon; ĉar ne vane li portas la glavon, ĉar li estas servanto de Dio, venĝanto por kolero kontraŭ tiu, kiu faras malbonon. 5 Sekve estas necese submetiĝi, ne nur pro la kolero, sed ankaŭ pro konscienco. 6 Ĉar pro tio vi ankaŭ pagas tributon, ĉar ili estas servantoj de Dio, klopodantaj por ĉi tio mem.*** (Romanoj 13, 1-6)

Paŭlo ne starigas sur tiu kampo iun ajn hierarkion laŭ la linio de la sistemo, ĉar ambaŭ niveloj lokiĝas en malsamaj terenoj: nek la eklezio sin metas supre (instruante la ŝtaton), nek la ŝtato povas plenigi ĉion (trudante sian vidpunkton al la eklezio). Ĉi tio signifas ke ambaŭ institucioj devas akcepti sian propran limon, ene de plurala mondo. 1. La ŝtato devas rezigni sian diecon, t.e. sian deziron je absoluta kontrolo. 2. La eklezio devas rezigni sian deziron strukturiĝi kiel povo, kiel institucio kiu uzas propran aŭ ŝtatan perforton por plenumi siajn celojn. Tia estis la intenco de Paŭlo, sed la historio disvolviĝis alimaniere, tiel ke (kontraŭ la doktrino de Tomaso el Akvino kaj la mesaĝo de Paŭlo) fakte, oni uzis la perforton por disvastigi la fidon.



***Papo kaj episkopoj prenis la spiritan povon kaj ekde la pinto superregas la ceterajn povojn, dirante al la politikistoj-militistoj tion kion ili devas fari.***

La kristanismo konservis la Paŭlan idealon laŭlonge de preskaŭ tri jarcentoj, ne celante fariĝi iu povo antaŭ la imperio, nek serĉi leĝajn spacojn for de la superreganta socia ensemblo, sin bazante nur sur sia "homa vero", serĉante nur la eblecon oferi sian sperton de graco kunhavita ene de mondo kiu emis fariĝi perforta.

Siaflanke, la romia ŝtato, emis diigi sin, sed iom-post-iom perdadis sian identecon socian kaj eĉ la militistan, tiel ke ekde la 4a jarcento troviĝis sen forto antaŭ la kristanismo.

La vera problemo prezentiĝis poste, kiam la imperio, ŝanĝiĝinte la cirkonstancoj kaj rekonante la fiaskon de sia politiko de religia absolutismo, ne nur toleris la kristanismon (Konstanteno, Edikto de Milano), sed igis ĝin la oficiala religio. Tiamaniere, la kristanoj restis sub la protekto kaj la defendo de la imperiestro (Teodozio: jaro 380), kiu fariĝis, fakte, la garantianto de la vivo kaj la posedaĵoj, de la agado kaj la doktrino de la eklezio. De tiam, forlasante la skemo de separiĝo kiun proponis Sankta Paŭlo, stariĝis iu statuto de reciproka interligado, tiamaniete ke la ŝtato fariĝis oficiale kristana kaj la eklezio fariĝis imperi(ism)a (alprenante por sia institucio kaj disvastiĝado la uzojn kaj kutimojn de la imperio

mem). La ŝtato bezonis la eklezion por pluteni kaj plenumi siajn funkciojn kiel ŝtato. La eklezio apogis sin sur la ŝtato por disvastigi siajn pretenditajn evangeliajn idealojn.
Tiu estis agado de reciproka cedo, de reciproka febleco. La ŝtato malfortiĝis multege bezonante la Eklezion. La eklezio malfortiĝis kaj perdis grandparton el sia identeco apogante sin sur la ŝtato. Vere, la Imperio kaj la postaj regnoj alprenis kristanajn elementojn, kiuj tre gravis por la sekvinta kulturo de Eŭropo, tiel en la tereno de la interna libereco kiel de socia justeco, submetante sin tiele al iu tipo de kristana povo. Sed eble kiu plej ŝanĝiĝis estis la Eklezio, kiu alprenis aspektojn de la povo politika-militista, ideologia kaj ekonomia  kiuj la Apokalipso (Apokalipso ĉapitroj 13, 14 kaj 17) prezentis kiel komponaĵoj de la besto kaj la prostituitino.


*Koncilio de Niceo, jaro 325*

Verdire, multaj kristanoj sin oponis al tiu unua pakto eklezio-ŝtato, sed la ensemblo de la eklezio kaj la ŝtato akceptis ĝin: la imperiestroj tial ke konvenis al ili ĉar tiel ili povis fariĝi ne nur protektantoj, sed ankaŭ gvidantoj de la eklezio, investitaj jam de iu vera dia povo, tiamaniere ke la kronado kaj/aŭ sankt-oleado de la imperiestroj kaj la reĝoj estis interpretitaj kiel vera kristana sakramento; la episkoj (kaj en Okcidento la Papo de Romo) ĉar tiel ili ricevadis iun povon kaj povis uzadi ĝin favore al la «kristanismo». La fido daŭre estis konsiderita kiel Dia donaco, ligita al la libera elektado de la kredantoj, tiel ke principe oni povis altrudi al neniu. Sed en la praktiko la apartiĝo kiu estis postulinta Paŭlo (kaj Jesuo en Marko, 12,17) rezultis io neebla en tiaj cirkonstancoj.
Esta bone ke la imperio garantiu la pacon por la eklezio (kaj por ĉiuj kulturaj, sociaj kaj religiaj institucioj); estas bona la tolero. Sed  pli bone estus ke la paco estus postulinta nenian ajn kompenson: ke la imperiestro ne estus intencinta gvidi la eklezion, kiel reale okazis, invokante sian propran sanktan aŭtoritaton, kiel peranto de Dio; kaj ke la eklezio estus ricevinta neniun ajn privilegion aŭ povon kiun la imperiestro oferis al ĝi (ekde la Koncilio de Niceo, jaro 325, kie Konstanteno aperas kiel gastiganto kaj arbitracianto inter la episkopoj).
En tiu ĉi kunteksto oni komprenas la novan formon disvastigadi la kristanan fidon. De la momento kiam la eklezio kaj la ŝtato interligiĝas kvazaŭ ili estus du komplementaj manifestiĝoj de la sama Dio, granda parto el la konvertiĝoj al la kristanismo okazis rezulte de iu tipo je socia premo aŭ perforto. Tiamaniere, la episkopoj fariĝas alt-ranguloj de la imperio, tiel ke la eklezio fariĝas parto el la socia teksaĵo de la povo, komprenante ĝin en la hierarkia senco. Tiele komenciĝis esti malfacila vivi kiel civitano de la imperio ne estante kristano. Kompreneble, multaj paganoj konvertiĝas pro la sociaj kaj kulturaj profitoj kiujn alportas esti membro de la oficiala eklezio. En ĉi tiu kunteksto, kune kun la logika premo de la medio, kie la kristanismo fariĝas ne nur profito, sed preskaŭ socia neceso, aperas la unuaj konkretaj kazoj de perforto, influitaj de la fido.
Kompreneble, en tiu kadro, fariĝis fundamenta la ***politika povo (la socia povo) de la episkopoj***, kiuj tiamaniere aperas ne nur kiel perantoj de la evangelio, sed kiel garantiantoj de la politika ordo. Sendube ili multfoje ekzercis sian aŭtoritaton tre pozitive, humanitare, ĉar ĝenerale ili estis la solaj kiuj povis garantii iun tipon je socia ordo kaj justeco en mondo ŝanĝiĝanta, kie la falo de la imperio kaj la invadoj de la "barbaruloj" kreis grandajn pov-mankojn aŭ, eble pli ĝuste, mankon de socia ordo.
Post la ruino de la imperio en Okcidento (en la jaro 476), komenciĝas nova epoko de disvastiĝo de la eklezio (provizore ni flankenlasas la parton de la Bizanca imperio), tiel ke la latina kulturo eniras kun la kristanismo en lokojn kie la Romia imperio ne estis alveninte aŭ ne estis atinginte intense enradikiĝi.
La konvertiĝo de Norda Eŭropo al la Kristanismo konstituas iun gravegan kulturan kaj socian fakton, tiamaniere ke ni povas diri ke la «mallumaj jarcentoj» kiuj sekvis por la ruino de la Romia Imperio kaj antaŭis la ekaperon de MezEpoko, la Eklezio agadis kiel baza socia kaj kultura faktoro. Sen tiu laboro de la eklezio oni ne povus paroli pri Eŭropo. Sed temas pri laboro kiu ne estis evangeliiga aŭ, pli ĝuste, evangelia, sed ankaŭ politika kaj socia, perfort-tipa. Eble, la portantoj de la kristana fido foje estis malpli per-

fortaj ol la perantoj de la pagana soci-ordo. Sed, sendube, ankaŭ ili estis intense perfortaj: ili disvastigis la fidon helpe de la politika kaj socia perforto de la nova kulturo.
Laŭ tiu linio situiĝas kaj antaŭeniras granda parto el la konkerado kaj evageliigado de Ameriko, kiun iuj hispanaj historiistoj taksis, triumfmaniere, asertante ke ĝi estis la plej granda kristana laboro post la Redempto fare de Kristo.
La hispanaj misiistoj de Ameriko (kaj iusence ankaŭ de Afriko kaj Azio) uzis la glavon (de la perforta konkerado) por disvastigi la fidon. Evidentas ke la hispana konkero de granda parto de Ameriko, kun la posta apero de la amerikaj ŝtatoj, ekde Meksiko al Ĉilio, ekde Peruo al Brasilo, enhavas kulturajn kaj sociajn valorojn kaj ankaŭ grandajn misagojn. Unue, la katolika eklezio pravigis kaj promociis tiun perfortan konkeron kaj koloniigon kun iu religia celo, konsiderante ĝin kiel ilo por la etendiĝo de la kristana fido. La papoj, kaj kun ili episkopoj kaj "kristanaj" reĝoj, estis plenkonvinkitaj pri tio ke por propagadi la evangelion estis bona kaj deca la milita perforto (konkero kiel sankta milito). Vere, estis momentoj kiam la misiistoj agadis sen la apogo de la glavo, tio estas, la povo de la reĝoj kaj de la konkerantoj, sed temis nur pri marĝenaj kazoj kaj dum malmulte da tempo. Ĝenerale, kaj kun la aprobo de la papoj, la evangeliigado (kiu devintus esti signo de pura bonvolo, sen politikaj altrudoj) disvolviĝis sub la apogo (la protektorato) de la reĝoj, kiuj elektadis la episkopojn kaj sendadis la misiistojn kiuj estis implikitaj en iu sankta konkerado (kontraŭkristana!).
Estas evidenta ke ni ne povas prijuĝi la pasintecon. Sed ni povas kaj devas deklari, ekde nia perspektivo, ke tiu pasinteco ne estis tre kristana, en la radikala senco de la vorto: profiti la militistan konkeradon por disvastigi iun pretenditan evangelion de bonvola libereco inter gentoj de malsupera kulturo ne ŝajnas respondi al la mesaĝo de Jesuo. Hodiaŭ. Ni povas deklari ke, se la celo ne pravigas la rimedojn, en la fundo de tiu unua evangeliigado de Ameriko enestis iu origina peko de perforto.
La 12a jarcento estis komenciĝinta post la ***unua krucmilito*** (1095-1099) kaj la konkero de Jerusalemo (jaro 1099) kaj finiĝis kun la refalo de la antikva urbo sub la povo de la muzulmanoj (jaro 1187). Ankoraŭ ne estis aperintaj la t.n. nacia ŝtatoj, nek ekzistis iu socia strukturo sendependa de la religia.
Tiam estis ***kristanaro***: regnoj, princlandoj, teritorioj kiuj ĉirkaŭis kelkajn centroj de politika influo kaj ĉefmaniere ĉirkaŭ la Papo. En la Nordo kaj Oriento restis ankoraŭ popoloj kiuj ne estis bone kristanigitaj, sed ili konstituis neniun danĝeron: iom post iom ili estis enirantaj en la kristanan unuecon de Okcidento. Oriente troviĝis la ortodoksoj de la Bizanca imperio (kaj Rusujo). Teorie ili estis aliancanoj, sed ilia propra socia kaj religia evoluo apartigadis ilin el la korpo formita ĉirkaŭ la Papo.



***La 12a jarcento estis komenciĝinta post la unua krucmilito (1095-1099)***

Tiamaniere, por iuj ***la eklezio*** identiĝis kun la okcidenta kristanaro kaj ekster ĝi (ekstere de la areo signita de la bona fido) staris ***la aliaj, la malfideluloj***, tio estas, la muzulmanoj, preter iu linio kiu komenciĝas Ŭeste (Hispanio), trairas la centro de la Mediteraneo kaj alvenas oriente al Egipto, Palestino, Sirio, Mozopotamio. La mondo ŝajnas rompita en du duonojn interfrontitajn en dura milito kiu tiam komencis esti konceptita kiel sankta. La unuaj kristanoj estintis malamikoj de la milito, tiel ke ili promociadis sian fidon pere de la vorto kaj viv-ekzemplo. Sed ekde tiu momento kiam kristaniĝis, tiel la imperio kiel la regnoj de okcidento ili emis identigi la kristanan fidon kun sia propra politik-socia strukturo. Tial ili pensis ke ilia militado kontraŭ la paganaj "barbaruloj" estis bataloj favore al la fido, do la milito komencis esti rigardata kiel iu permesita kaj eĉ religia fakto: Ĝi protektadis la kredantojn antaŭ la danĝero kiun signifis la malfideluloj.
En la sama skemo de perforto, kun elementoj pli proksimaj al la Antikva Testamento hebrea ol al la mesaĝo de Jesuo kaj la nova judismo, jam moviĝadis la muzulmanoj, kiuj konceptadis kaj

praktikadis la militon kiel ilo de konkero kaj kredo-ekspansio, en formo kiu konstituis minacon por multegaj kristanoj, ekde Hispanio ĝis Bizanco. De homa vidpunkto, kompreneblas ke tiu pretendita muzulmana minaco vekus ian mimetisman kristanan respondon, de krucmilito aŭ ***sankta milito***. La kristanoj, tre konsciaj pri si mem, volis retrovi sian fonton en la tero kie naskiĝis ilia fido, Jerusalemo, por respondi tiamaniere la Dian alvokon pere de la milito. Vere, ili ne forgesis la misiistan postulon: ili sciis ke la mesaĝo de Jesuo devas esti disvastigita en momentoj de paco, pere de la vorto; sed ili pensis ankaŭ ke tiu mesaĝo troviĝis subdanĝere de la muzulmana forto kaj tiel ili voli defendi ĝin per iu supera kristana forto.

Laŭ tiu vidpunkto, la unua kaŭzo kaj kialo de la milito estas religi-tipa: la defendo de la fido, objektive interpretita, tio estas, kiel protektado de ***la aferoj de Dio***, tio estas, de la establita eklezio, de sia kulto-libereco, ktp. La fido fariĝis, laŭ tio, iu socia institucio, iu origina valoro, prioritata eĉ al la vivo, la posedaĵo, la familio kaj la patrujo, ĉar en la kristana fido baziĝas kaj ĉerpas signifon la ceteraj valoroj de la persona kaj socia vivo de la kredantoj, La milito kiu aperas tiele, fido-defende, oferas ian "simetrian" perforton, ĉar oni supozis ke ankaŭ la ***malamikoj de la katolika fido*** uzis saman militon.

Ĉio-ĉi situigas nin antaŭ iu tipo je religiaj militoj, en kiuj iuj aperas kiel amikoj de Dio kaj aliaj kiel Liaj malamikoj, laŭ la vidpunkto de ĉiu el ili. Ekzistas, do, ia simetrio inter ambaŭ flankoj. Unu sama milito povas esti sankta iusence por la muzulmanoj (imitantoj de la militista Mahometo) kaj sankta alisence por la kristanoj, kiuj ŝanĝas la sencon de la kruco (kiu signifas lasi sin mortigi favore al la aliaj) kaj igas ĝin (kun la beno de ekleziuloj kaj papoj) standardo de iu perforto «evangelia», asertante ke la apostoloj mem kiel Sankta Jakobo batalis kaj batalas nome de Kristo kontraŭ la muzulmanoj. Ĉi tiu estas la loko kie oni pli klare esprimis la militan perforton ligita al iu formo interpreti la kristanan fidon.

La nuntempa kristana leĝaro, prezentata de la ***Katekismo de la Katolika Eklezio***, ne defendas eksplicite la sanktan militon, fido-defenda, laŭ la mezepoka tradicio, tamen ĝi daŭre akceptas la koncepton de justa milito, kiun oni povas kaj devas proklami kaj realigi pro du kialoj tre konkretaj, unu el kiuj situigas nin tre proksime de la sankta milito fido-defenda.

Verdire, la nuntempa Kodo pri Kanona Rajto tre pritaksas la gravecon de la biblia kaj kristana sperto de la martiriĝo, interpretita kiel suprema atesto de la fido. Sed, samtempe, ĝi supozas ke ekde la momento kiam la kristanoj konstatas ke ili kapablas malhelpi la perfortigon de la homaj rajtoj, ribelante kun armiloj kontraŭ tiuj kiuj sin oponas al la religia libereco, ili povas kaj devas tion fari.

Laŭ tio, ŝajnas ke la martiriĝo restas por situacioj kiam oni ne povas agadi alimaniere (cirkonstancoj de granda malsupereco de socia kaj militista vidpunkto). Sed tie kie oni povas eviti, ribelante kun armiloj, la martiroj povas fariĝi soldatoj, ne por defendi la fidon mem (ne ekzistas sankta milito), sed, jes ja, por defendi la liberecon esprimi la fidon. Tio signifas ke la Katekismo daŭre defendas iun tipon je justa milito, laŭ la kristan-



ismo, iu milito por la defendo de la grandaj valoroj de la homa vivo, inter ili la religia libereco. Por la nekapabla venki, restus la martiriĝo. Por la venko-kapablaj, superante tiele la piedpremadon, oni defendus la sanktan militon.

Eblas tio ke inter la instigo al la martiriĝo kaj la defendo de la justa milito (en la kazo ke ĉi tiu povus esti sukcesa), ekzistus kontraŭdiroj kiujn la Katekismo ne sukcesis sufiĉe kontempli. Ŝajnas ke, tiukaze, samkiel en kio koncernas al la socia subpremo kaj la malliberejo, tiu ĉi Katekismo situiĝas en la nivelo de reciproka puno, tio estas, perforta alfrontiĝo kontraŭ la perforto. Vere, la rezistorajto troviĝas inter tiuj kiujn Paŭlo akceptus por la ŝtato kiu portas la glavon (Romianoj 1, 1-7). Sed temas pri rajtoj de la civila socio, ne de la eklezio nek de la kristanoj (kiuj devas vivi laŭ la Prediko sur la monto: «tamen mi diras al vi: ne rezistu kontraŭ la malbono»).

Sed jam ni vidis ke la nuna situacio situigas nin en la plano de la reciproka puno.





La Eklezio konsideras sin kapabla asigni al la civila povo la rajton je perforta subpremado de la perfortantoj (uzante la malliberejon kaj eĉ la mort-punon). Ĝi koncedas ankaŭ la ***milito-rajton***, por sin oponi tiamaniere al la agresantoj kaj, inter ili, al tiuj kiuj neas la religian liberecon. Vere, la eklezio ne volas militi, sed koncedas al la civila povo la rajton (kaj la devon) militi, por tiel defendi la valorojn kiujn ĝi proklamas. Ni ne troviĝas malproksime el la vidpunkto de Bonifaco la 8a, ***Unam santan***, nek el la spirito de la ***Donaco de Konstanteno***, ĉar la eklezio "koncedas al la ŝtato la moralan povon de la perforto".

Tiu ĉi vidpunkto povas esti perfekta en la jura aŭ leĝa tereno, en la marko de la civilaj povoj, sed eble ne povas (nek devas) esti defendata ekde iu kristana perspektivo, ĉar la kristanismo, esence, ne povas sin turni al la ŝtata povo por ke ĉi tiu garantiu perforte la religian liberecon.

Nu, superinte iun kelkjarcentan "antaŭjuĝon", la Katolika Eklezio malkovris kaj proklamis en la 2a Vatikana Koncilio la originan valoron de la religia libereco, ligita al la naturo mem de la religio kaj la fido. Tiucele estis necesa iu longa procezo, ankoraŭ daŭranta, ĉar la formala libereco ne sufiĉas, sed estas necesaj tiuj kondiĉoj kiuj ebligas la disvolviĝon de la persona kaj komunuma fido en libereco.

Ni vidis la tri bazajn terenojn kie la klasika doktrino de la katolika eklezio fakte pravigis la perforton, almenaŭ ekde la 13a jarcento: por disvastigadi la fidon, por defendi la fidon kontraŭ ĝiaj eksteraj malamikoj (krucmilitoj) kaj por konservi la fidon de la kredantoj (inkvizicioj). En ĉiuj ĉi kazoj, la fido aperas kiel objektiva valoro, kiun oni povas promocii kaj subteni pere de iu tipo je altrudo aŭ milito, ene de iu mezepoka vidpunkto pri la vivo. Tiamaniere strukturiĝis, sur kalkulo je perforto, la kristana mezepoka identeco de Eŭropo kiu, iusence, daŭre influis ĝis la nuntempo (almenaŭ inter multaj katolikoj, kaj eĉ en la oficiala vidpunkto de la Roma hierarkio).




RECENZO

# JIĤAD

## Kiel oni financas la terorismon en la nova ekonomio



Verkis: ***Loretta Napoleoni***
*Ekonomistino kaj ĵurnalistino, specialigita pri internacia terorismo, ekonomio kaj araba mondo. Nuntempe ŝi estas priekonomia esploristino en la* ***London School of Economics****, ŝi estis asesorino de la* ***NAO*** *(Nutraĵa kaj Agrokultura Organizo de UN) kaj de la* ***Eŭropa Banko por la rekonstruado kaj la Disvolvigo.*** *Aŭtorino de kelkaj verkoj pri la sama temo.*

La recenzata verko ne ekzistas en Esperanto. Ĉi tiu informo baziĝas sur ĝia hispanlingva versio. Tiu ĉi libro estas la unua plene dediĉata al la temo de la nova ekonomio de la nuntempa islama terorismo. La aŭtorino asertas ke la islama terorismo ne estas reale religia, sed ekonomia.

Laŭlonge de la lastaj kvindek jaroj, la ekonomia kaj politika supereco de Okcidento malhelpis la disvolviĝon de iu emerĝa ekonomio kaj iu financa forto ekzistanta en la muzulmana mondo. Tiu ĉi forto starigis aliancojn kun islamismaj armitaj grupoj kaj kun religiaj lideroj apartenantaj al la plej radikala linio, ene de iu kampanjo kiu celas liberigi la muzulmanajn landojn el la influo de Okcidento, samkiel el la oligarkiaj lideroj de Oriento. Same kiel okazis en la kruc-militoj, la religio estas nenio pli ol nura instrumento por la varbado de batalantoj, la vere impulsanta forto estas la ekonomio.

La kerno de ĉi tiu stud-verko estas la celo demonstri tion ke, laŭlonge de la lasta duonjarcento, la anoj de la armitaj organizaĵoj estis persekutataj en siaj propraj landoj fare de la samaj politikaj fortoj kiuj impulsis ilin servi, ekster ilia teritorio, la ekonomiajn interesojn de Okcidento kaj ties aliancanoj, dualeco kiu provizis al la organizaĵoj de la teroro la eblecon organizi sian propran ekonomion. Ĉi tiu fenomeno estas difinata de la aŭtorino kiel Nova Ekonomio de la Teroro, iu internacia reto kiu interkontaktigas la sistemojn je apogo kaj pri loĝistiko de la armitaj grupoj.

Tra iu ampleksa esplorado, Loretta Napoleoni analizas multenombrajn dokumentajn kaj atestajn fontojn. Ŝi pruvas ke la grandaj historiaj movadoj, kiel la mezepokaj kruc-militoj kaj la Malvarma Milito, havis ekonomiajn radikojn kaj motivigilojn, kaj la batalantoj estis pelitaj al ia eksterleĝa perforto financita per la rabado. Ĉiuj formoj je terorismo, tiu de la 11a de septembro de la jaro 2001 kontraŭ Usono, ĉiu ajn suicida atako aŭ tiu perforto kiu alprenas la formon je movadoj de nacia liberigo aŭ sendependigo, ne povas prosperi sen ia senĉesa fluo je kontanta mono.

La libro eksplikas kiamaniere atingas la nepran ekonomian nutraĵon tiuj movadoj, kiel tiu de la talibanoj kiuj, organizitaj kaj armitaj de la CIA en la jardeko 1979-1989 forpelis la Ruĝan Armeon el Afganio, la batalado kiu en Argelio metis finon al 130 jaroj da koloniisma franca superregado, kaj la nuntempaj sangoversaj civil-militoj en multaj lokoj en Afriko. Ofte la batalantaj grupoj kiuj sukcesas plenumi sian originan celon pluekzistas evoluante al novaj klopodoj, tia estis la kazo de AlKaedo kiu adresiĝis kontraŭ Okcidento post la atingo de sia origina celo.

La aŭtorino priskribas sistemon de 1,5 bilionoj da dolaroj kiu senĉese kreskas, kaj en kiu partoprenas la drog-trafikantoj, la magnatoj de la petrolo, trafikantoj de gemoj kaj homaj estaĵoj, mondonacoj kiujn respektindaj bankoj kaj aliaj financ-institucioj traktas ofte kalkulante ke ili estas destinataj al organizaĵoj tute homfavoraj.
Grupoj kiel Al-Kaedo, kiu rezultis el la milito de Afganio kaj fariĝis tutmonda terorista reto, estas pelataj ne nur de la realaj ekonomiaj faktoroj de la Tria Mondo kaj ĉefe de la muzulmanaj ŝtatoj ekde Maroko al Indonezio, sed ankaŭ de multaj kunkulpuloj ekde la sino mem de Okcidento, ekde la plej sanktaj bastionoj de la okcidenta kapitalismo, Wall Street, la londona City, la financ-magnatoj de Hong Kong, Saŭd-Arabio kaj Sudŭest-Azio.



La Nova Ekonomio de la teroro, kies grandon Loreta Napoleoni taksas, proksimume, je 5 procento el la tutmonda neta produkto, estas rezulto el iuj historiaj procezoj kaj iu moviga strukturo kiu nutras kaj subtenas la terorismon mondskale. Ŝi opinias ke tiu nova ekonomio ekzistas en rilato de interdependeco kun la okcidentaj merkat-ekonomioj, kaj samtempe en stato de kreskanta streĉiĝo rilate al ili.
Celante klarigi tiun paradokson, la libro komenciĝas prezentante kaj priskribante la historian procezon kiu generis la nunan situacion. La terorismo pravigita de la Malvarma Milito generis serion da armitaj grupoj kiuj memfinanciĝas per kontraŭleĝa agado kaj samtempe evoluas al organizaĵoj kiuj dum ili klopodas plenumi siajn celojn, uzas kaj demarŝas tre evoluitajn komercajn teknikojn kaj financajn mediojn. Iuj el ili starigis kvazaŭ-ŝtataj strukturoj kiuj rekte interrilatas kun la naciaj ŝtatoj kaj ties financaj institucioj, kaj estas tiu kunteksto kio plifirmigas la Novan Ekonomion de la Teroro.
Estiĝas iu nova kaj ŝokiga paradokso: fakte la Nova Ekonomio de la Teroro estas rezulto de la tutmondiĝo, kaj ĉefe de la plirapideco kiun ĉi tiu akiris post la disfalo de la Berlina murego. La tutmondiĝo ebligis ke la ne-registaraj organizaĵoj promociu serion da liberalaj kaŭzoj, sociajn ŝanĝojn, ekonomiajn progresojn, sed ankaŭ faciligis la strukturiĝon de teroristaj movadoj kiel Al-Kaedo kaj la kreskiĝantan pliperfektiĝon de la ekonomio de la teroro. La procezo je privatigo, la merkat-senreguligo, la malapero de la land-limoj, la libera moviĝo de la laboristoj kaj la kapitaloj, la teknologiaj progresoj kiuj estis laŭditaj kiel la iloj de la ekonomia sukceso de la lastaj jardekoj: ĉio ĉi estis profitata kaj adaptata de la ekonomio de la teroro. Tio estas, la fortaj aspektoj de la laŭleĝa ekonomio fariĝis ambaŭtranĉa glavo.
La Nova Ekonomio de la Teroro ne eblis antaŭ la fino de la Malvarma Milito. Certe estis teroristaj organizaĵoj en tiu periodo, kaj iuj el ili eĉ atingis sian celon, kaj, kompreneble, ankaŭ ili bezonis financadon. Sed la nuntempa ekonomio de la teroro estas nepre ligata al la globaliĝo aŭ tutmondiĝo kiu okazis post la finiĝo de la Malvarma Milito kaj ties politikaj kaj ekonomiaj sekvoj.
La retoriko de la teroristaj grupoj kaj ties simpatiantoj tre emfazas kaj insistas pri la kontraŭdiro inter la dominanta okcidenta kapitalista sistemo kaj la grandamasa islama nacio kies emerĝanta klaso da komercistoj kaj bankestroj trovas fermitaj aŭ baritaj la vojojn al disvolviĝo kaj prospero. En la fundo de tiu propagando enestas la revo de renversigo de la situacio simile al tio okazinta en Mezepoko, kiam la dominanta islama mondo estis defiata de iu eŭropa ekonomia klaso pere de la kruc-militoj kaj, fine, la muzulmana mondo sukcesis rezisti kaj venki tiun malamikan civilizacion.
La ekonomia analizado de la interrilatoj de la Nova Ekonomio de la Teroro kaj la okcidentaj ekonomioj sugestas ke en la batalo kontraŭ la terorismo plej gravas identigi kaj fermi la kanalojn de financado de la armitaj grupoj, tasko kiu koncernas al la registaroj.
La legantoj de la libro kiun ni pritemas havas antaŭ si la taskon studi kaj decidi ĉu estas prava la tezo de la aŭtorino kiam ŝi diras ke la batalo kontraŭ la islama terorismo kaj la ideoj kiujn ĝi propagandas devas esti realigata ĉefe en la ekonomia tereno. Ĉar estas ankaŭ (religiaj) ideoj en la propagando por varbado de teroristoj, oni devas prikonsideri ankaŭ la neceson batali ankaŭ en la ideologia tereno.

# Falintaj folioj



Verkis: *Ildefonso Domínguez Losada*

Marko ĵus emeritiĝis. Li plenumis freŝdate la devigan aĝon laŭ la hispanaj leĝoj.
Nun li sidas sur lulseĝo en teraso de lia bieno en kampara loko. Kun malfermitaj okuloj li rememoras pasintajn travivaĵojn ekde lia junaĝo ĝis nuntempo. Li kapablas `vidi', kvazaŭ rigardante filmon, diversajn etapojn de sia vivo.

Dum malmultaj minutoj pasis antaŭ la okuloj de Marko, centoj da bildoj de tiuj malproksimaj tempoj, kiam li estis juna kaj forĝis tiom da projektoj; de liaj iamaj ambicioj kaj deziroj, inter kiuj li kalkulis esti pli simpatia, pli kuraĝa, pli progresema homo. Kiom multe li suferadis, ĉar li ne sentis sin tiel altira, ekzemple, por siaj klaskunulinoj, nek tiel fortulo, kiel la plej multo el la junuloj de sia kurso!

Ŝajnas ke tiuj eventoj, kiuj nun okupas liajn pensojn, okazis la hieraŭan tagon, kaj pasis jam… pli bone ne pensi pri tio. Kiel eblas, li pensas, ke la tempo tiel rapide pasu..?

Li fieras rememorante kiom multe li sukcesis atingi dum tiuj pasintaj jaroj, danke nur al siaj penlaborado kaj disciplino. Ankaŭ en la atingo de ĉi tiu socia rango, kiun li kaj liaj karuloj ĝuas nun, havis specialan efikon tre bona familia ekonomio.

Marko dum juneco dumlonge estis sekrete enamiĝinta al Maria, tiu bela kunulino de lia sama klaso, kvankam malfeliĉe, ŝi nenion sciis pri tiu amo. Maria, laŭ tiama opinio de Marko, estis la plej bela estaĵo kiu povis vivi sur la tera surfaco laŭlonge de la jarcentoj. Maria, Maria, Maria… nur prononcado de tiu nomo kaŭzis al li diversajn emociajn sensaciojn. Maria, Maria… Marko ofte en siaj junaj sonĝoj vidis kaj konsideris ŝin kvazaŭ anĝelo. Maria…

Sed Marko tiutempe ne havis sufiĉe da kuraĝo por diri al ŝi kion bela li trovas ŝin kaj proponi esti ŝia fianĉo. Sankta Dio!, kiom li ekmalamis Antonon, tiun arogantan kvankam allogan viron, vidante lin kun Maria brakenbrake, unuafoje!

Marko filozofas, pri la paradoksaj travivaĵoj de la homa vivo. Li dum juneco estis malkuraĝa viro, ne sufiĉe belaspekta nek forta kiel tiu ulo, nek kiel ĉiuj aliaj konatuloj de tiam, kiam ili studis abiturientecon, tamen nun li sin sentas kvazaŭ junulo. La pasado de l'tempo ne lasis sur li tiel profundajn spurojn kiel li observas sur la vizaĝoj aŭ korpoj de

diversaj konataj samaĝuloj, ĉar li ankoraŭ kapablas kuri ĉiumatene, almenaŭ 5 kilometrojn antaŭ la matenmanĝo, kaj promenadi vespere kune kun la edzino. Li ankaŭ ne tinkturadas siajn abundanjn mez-grizajn harojn, kaj li montras interesajn blankajn vango-harojn.

Ofte li ludas tenison kun najbaraj amikoj de tiu urbanizaĵo kie li loĝas, legas ĉiaspecajn periodaĵojn, librojn, k.t.p., sen okulvitra helpo. Tial, li sin konsideras feliĉulo.

Antono kaj Maria (kiaj sensacioj! li ne povas ankoraŭ eviti ektremon nur je la penso pri ŝi) elmigris en Aŭstralion kaj restis tie dum kelkaj jaroj, sed ili ne adekvate sukcesis progresi. Ili ambaŭ penege laboris en kelkaj tieaj entreprenoj, tamen iliaj salajroj ne estis sufiĉe altaj por atingi pli altan socian rangon, kiel kutime okazas al la plej multo el la elmigrintoj. Marko ĵus vidis kaj salutis ilin la antaŭan tagon, post longaj jaroj sen scio pri ili, kaj pro tio li nun komencis rememori pri pasinteco…

La aspekto de ambaŭ geedzoj, okazigis al Marko kvazaŭ deprimon. Ŝajnas ke la vivo punis ilin sen kompato. Antono, lia "rivalo" pri la amo de la bela Maria, iam orgojla, forta kaj aroganta junulo, kiel jam dirite, trans-formiĝis en mal-junan senharan dikulon, kapabla promenadi nur helpe de bastono. Malgraŭ tio ke Antono kaj Marko estas samaĝuloj, ŝajnas al Marko kvazaŭ tiu ulo estus kelkajn jarojn pli aĝa ol li. Sed, kion diri pri Maria? Kiel domage! Tiu, kiu iam estis belega junulino perdis plejparton el ties beleco. Tiu, kiun iam admiris Marko, nuntempe montras videblajn grandajn bluringojn samkiel profundajn haŭtsulkojn, eble pro familiaj aŭ ekonomiaj problemoj (ŝi akuŝis kvar gefilojn). Ŝia nigra kaj brila hararo dum juneco, estas nun duonblanka-duonnigra, trista, preskaŭ sen vivaj signaloj.
Marko bedaŭras tian situacion. Li havis, tiurilate, pli bonan ŝancon ol liaj kolegoj. La vivo ne estis kaj por li, kaj por liaj karaj tiel kruela. Li estas feliĉe edziĝinta. Lia edzino, Lizabeta, en tiu epoko kiam Marko enamiĝis al ŝi, ne tiel estis svelta nek belaspekta kiel Maria, sed tamen li trovis en ŝi gravajn kvalitojn. Ŝi estis simpatia, agrabla, bonkora kaj post geedziĝo, ŝi iĝis bona edzino kaj tre bona patrino.

Pri aliaj junulinoj de lia juneco, li nenion scias. Eble ili vivas en la sama urbo, sed li ne kapablis iun rekoni se okaze li pasis proksime al iu el ili. El la iamaj gekonatuloj, li de tempo al tempo parolas nur kun Johano kaj Ludoviko, ambaŭ loĝantaj en lia sama urbo, sed pri la ceteraj nek li, nek la menciitaj Johano kaj Ludoviko, scias ion.

Johano, kiu, ankaŭ li, estis tre orgojla kaj malmodesta junulo, ĉiam akompanata de belulinoj, restis fraŭlo, kaj Ludoviko, kiu ĉiam trovis respondojn por ĉio, suferis, antaŭ kelkaj jaroj, gravan trafikakcidenton, el kiu li restis kripla. Ankaŭ li devas pasi sin apogante sur bastono.

Kion malproksime estas tiuj tagoj..! Kiom da malgajaj rememoroj ili alportas al Marko..!

Nun la vento ekblovas. Estas aŭtuna sezono. El iu proksima arbo kelkaj folioj falas teren, dum aliaj ankoraŭ pendas el la arbo kie ili naskiĝis. Eble ili atendas alian ventoblovon por sekvi la saman vojon ol la antaŭe falintaj. Marko vidante la foliojn, distre, senpripense, ne povas eviti kompari tiujn vegetalpecojn kun tiuj iam viglaj gejunuloj falintaj en misfortuno kaj mallaŭte, malgaje, murmuras: Bedaŭrinde! Jen ili estas kvazaŭ falintaj folioj.







J.Leslie Mitchell

# SPARTAKO

**El la angla al Esperanto, tradukis**

## William Auld





La historio de Spartako, la gladiatoro kiu gvidis ribelon kontraŭ la sklavista povo de la Romia Imperio en la unua jarcento antaŭ nia erao, inspiris kelkajn verkojn, kiel tiuj de Artur Koestler, Rob Shone, Howard Fast... Surbaze de la teksto de ĉi lasta oni faris faman filmon kiu, tamen, ne estis la sola kiun oni faris pri Spartako.


Verdire, oni ne konas multe pri la heroa komandanto de la ribelintaj sklavoj, ĉar ne plaĉis al la romianoj verki pri sklavo kiu batalis kontraŭ ili kaj krome venkis ilin kelkfoje. Do, ĉiuj filmoj kaj libroj pri li koincidas nur en tiu malabunda informo je kiu oni disponas. La cetero estas frukto el la imago-kapablo de la verkistoj.


Al la jam menciitaj verkistoj pri Spartako ni devas aldoni la romanon aŭ novelon de J.Leslie Mitchell. Tiu verko havas specialan signifon por ni, esperantistoj, tial ke el ĉiuj verkoj ĝis nun publikigitaj pri Spartako, ĉi tiu estas la sola kiu estis tradukita al la Internacia Lingvo. La traduko estis farita de William Auld, iu el la plej grandaj verkistoj en Esperanto, kiu forpasis pasintjare. La tradukaĵo, kiel ĉiu verko de W.Auld estas fajna, altkvalita.


Kiam li mortis, proksimume antaŭ unu jaro, nia antaŭa numero de la revuo HELECO estis ĵus eldonita kaj ne eblis mencii en ĝi tiun malfeliĉan eventon. Nun ni dediĉas tiun ĉi memoron al la granda verkisto-tradukisto en Esperanto.


Ni komunikas al la membraro de nia E-Asocio ke estas ekzemplero de tiu verko en nia biblioteko.


















# Anamorfoza surpavima pentr-arto



Laŭ la difino kiun prezentas la **Plena Ilustrita Vortaro**, ***anamorfozo*** estas: Desegnaĵo, kiu ŝajnas konfuza, sed prezentas regulan bildon, se rigardata de difinita punkto aŭ post reflekto sur kurba spegulo.
La anamorfoza pentr-tekniko ne estas tro moderna afero; fakte, jam oni uzas ĝin de antaŭ kelkaj jarcentoj. Estas ĝenerala opinio ke Leonardo da Vinci estis la unua uzanto de tiu metodo je pentrado. Poste, ĝi estis rapide adoptita de multaj artistoj. La metodo permesas al la pentristo kaŝi figuron ene de la pentraĵo, tiamaniere ke ĝia formo estu rekonebla nur se oni rigardas la bildon ekde iu konkreta angulo aŭ helpe de kurbaj speguloj aŭ lensoj.
En la pentraĵo La ambasadoroj de Hans Holbein "la Juna" (1497-1543) estas sceno plena da simboloj. Sed krome la pentristo uzas anamorfozon por kaŝi la bildon kiu donas alian sencon al la pentraĵo (vidu la bildon sur ĉi tiu paĝo). Laŭŝajne, la temo de la pentraĵo de Holbein estas la surteraj povoj, t.e. la povoj de la mondo: iu ambasadoro reprezentas la politikan povon, la alia la povon de la Eklezio kiu, ankaŭ ĝi, estas politika. Malantaŭ ambaŭ ambasadoroj, serio da objektoj reprezentas la povon de la scio de la scienco kaj la kulturo.
Tamen, la kaŝita bildo en la malsupra parto de la pentraĵo reprezentas aŭ simbolas la homan vantecon: ĉiuj menciitaj povoj estas dumtempaj, provizoraj, eventualaj… Fine, post ili, troviĝas la morto (simbolita per la kranio). En tiu epoko la kono ĝenerale estis rezervita al malmultaj personoj, ĝuste al tiuj kiuj kontrolis la povon: la nobeloj, la riĉuloj, la ekleziuloj… La pentristo mokas precize pri ili, ne pri la kono mem.
Aliaj artistoj uzis similajn artifikojn kiam ili deziris kaŝi en la pentraĵojn bildojn portantaj kritikajn mesaĝojn de religia aŭ politika tipo.
Sed krom tiu tradicia uzado de la anamorfozon en la klasika pentr-arto, lasttempe aperis aliaj formoj je uzado de tiu artifiko de pentrado. Te-



Rigardata ekde la konvena angulo kaj distanco, la parto el la pentraĵo enkadrigita per flavaj linioj aspektas tiel kiel montras la bildo dekstre.



mas pri strataj surmuraj aŭ plej ofte surpavimaj pentraĵoj.
Same ol ĉiuj anamorfozaj bildoj, la verkoj de tiu strata arto se oni ne rigardas la pentraĵon ekde la ĝusta flanko kaj perspektivo, la bildo aperas trolongigita, distordigita. Sed kiam oni elektas la ĝustan lokon kiel vidpunkton, la bildo aperas tridimensia, kvazaŭ reliefa. Foje la celo de tiuj pentraĵoj estas komerc-reklama, sed plej ofte temas nur pri arto-ludo.
Iu interreta paĝo informas pri tiutipaj pentraĵoj faritaj de argentinaj gestudentoj sur la trotuaroj de la stratoj de Bonaero. Simile okazas en aliaj lokoj.
Laŭŝajne ĉiuj ili estas imitantoj de Julian Beever, iu brita pentristo kiu de antaŭ 10 jaroj dediĉiĝas al la farado, per kreto, de tiuj surpavimaj tridimensiaj bildoj en la trotuaroj de multaj urboj en Eŭropo, Usono, Aŭstralio…
Foje al li estas necese pentri dum tuta tago por fari unu el tiuj bildoj, kaj ĉar ili troviĝas sur trotuaro, ĝenerale la sekvan tagon la bildo estus forviŝita pro la pasado de personoj sur ĝi. Nur danke al fotografiado persistas la memoro de tiuj artaĵoj.






**Se oni ne rigardas la pentraĵon ekde la ĝusta flanko kaj perspektivo, la bildo aperas trolongigita, distordita...**

La fotoj de tiuj bildoj povas ŝajni foto-muntajoj, tiel reale aspektas la reliefo aŭ tridimensieco, sed temas pri desegnaĵoj faritaj per koloraj kretoj, sed, jes ja, fotitaj ekde la konvena loko.
En la sekva paĝo aperas kelkaj el la pentr-verkoj de tiu artisto. Foje sur la bildoj aperas li aŭ aliaj personoj situantaj en difinita loko tiamaniere ke la ensemblo kreas la optikan iluzion ke la realaj personoj interagadas kun la personoj kaj la pejzaĝo de la pentraĵoj.
Ekzemple, en tiu pentraĵo en kiu aperas baseno kie baniĝas knabino, ĉio ŝajnas normala, esceptante tion ke la baseno ne troviĝas tie, kaj la piedo de Julian tuŝas la pavimon, ne la akvon. Tiu sama bildo, rigardata de alia flanko prezentus strangajn kaj ne rekoneblajn formojn.
En (sur) aliaj bildoj, la reala persono ŝajne troviĝas sur embrazuro de fenestro atendante la supreniradon de personoj kiuj estas parto de la pentraĵo sed kiuj ŝajnas interagadi aŭ interrilati kun la reala aldonaĵo, tiel forta estas la impreso de tridimensieco de la desegnita pejzaĝo.
Krom tiu tridimensia kaj efemera arto, Beever pentras surmurajn bildojn kaj labor-imitaĵojn de verkoj de grandaj artistoj de la pentrado. Kutime oni kontraktas lin por krei surmurajn desegnaĵojn por entreprenoj. Li dediĉiĝas ankaŭ al la desegnado destine al komerc-reklamo kaj merkatiko. Tiusence li laboris en Britio, Belgio, Francujo, Nederlando, Germanio, Italio, Usono, Aŭstralio kaj Hispanio.
Li sciis profiti sian arton kaj multaj firmaoj patronis lin kaj mendis al li anoncojn. Li desegnis iluziojn sur la pavimoj por Rembrandt (la marko de la kretoj kiujn li uzas por siaj desegnaĵoj), Koka-Kolao aŭ Sony Vaio. Li ankaŭ realigis iujn desegnaĵojn por la granda reklam-evento **Live 8**, la granda muzik-koncerto organizita de **Bono** de **U2** kaj **Bob Geldof**.
Foje li ankaŭ ricevis mendojn el la inform- kaj komunikad-medioj por soleni tiun aŭ tiun eventon, kiel la morto de **Lady Di** aŭ de la gereĝoj de Belgio.
Jen estas granda lia sukceso, iome paradoksa konsiderante ke la produktaĵoj de lia arto estas efemeraj. Sed tamen ili ne tiom estas efemeraj konsiderante ke ili konserviĝas per fotado, kaj nun liaj bildoj estas diskonigataj ankaŭ pere de Interreto. El tie ni atingis la bildojn kiuj aperas en la sekva paĝo.




**Diversaj surpavimaj anamorfozaj bildoj de Julian Beever, desegnitaj per kreto en la urbaj trotuaroj**




LA REĜA SOCIETO -- POLEMIKOJ PRI KLIMATA ŜANĜO: SIMPLA GVIDILO

La Reĝa Societo estas Kolektivo de 1400 elstaraj homoj reprezentantaj ĉiun areon de scienco, inĝenierio kaj medicino, kaj konsistigantaj tutteran sciencan reton plej altan kvalite. La Kolektivo subtenas permanentan skipon de 130 personoj kun respondeco pri la ĉiutaga administrado de la Societo kaj ĝiaj agoj.
Dum la Reĝa Societo pretiĝas por ĝia 350-jara datreveno en 2010, ĝi laboras por atingi kvin strategiajn celojn:

*** Investi celante estontajn sciencajn liderojn kaj renovigadon.**
*** Influi politikfaradon pere de la plej bona scienca konsilado.**
*** Vigligi edukadon sciencan kaj matematikan.**
*** Vastigi alireblon al scienco internacie.**
*** Inspiri intereson pri la ĝojo, miro kaj plenumeco de scienca malkovrado.**

La Reĝa Societo verkis ĉi tiun superrigardon pri la nuna stato de scienca kompreno pri klimata ŝanĝo por helpi nespertulojn kompreni pli bone kelkajn el la debatoj pri tiu malfacila areo de scienco.
La celo de tio ne estas provizi kompletan respondon al ĉiu polemika argumento kiun antaŭenpuŝas tiuj, intencantaj mismontri kaj senbazigi la sciencon klimatŝanĝan kaj negi la seriozecon de la gravaj sekvoj de tutplaneda varmiĝo. Anstataŭe, la Societo (kiel la Brita Nacia SciencAkademio) respondas jene al ok ĉefargumentoj nun cirkulantaj klarigante, per simplaj vortoj, kie kuŝas la pezo de scienca evidento.

Misgvida argumento 1a: La klimato de La Tero estas ĉiam ŝanĝiĝanta kaj tio ne rilatas kun homoj.
Misgvida argumento 2a: Karbondioksido konsistigas nur malgrandan parton el la atmosfero kaj do ĝi ne povas kulpi pri tuttera varmiĝo.
Misgvida argumento 3a: Altiĝo de karbondioksidaj niveloj en la atmosfero estas rezulto de altiĝintaj temperaturoj, ne male.
Misgvida argumento 4a: Takso de temperaturoj fare de veterbalonoj kaj satelitoj ne subtenas la teorion de tuttera varmiĝo.
Misgvida argumento 5a: Komputmodeloj prognozantaj la estontan klimaton estas nefidindaj kaj bazitaj sur supozaro.
Misgvida argumento 6a: Ĉio rilatas al la Suno. Ekzemple, estas forta ligo inter altiĝintaj temperaturoj sur la Tero kaj la kvanto da makuloj sur la Suno.
Misgvida argumento 7a: Al klimato ja efikas la kosmaj radioj.
Misgvida argumento 8a: La skalo de la negativaj efikoj de klimata ŝanĝo estas ofte troigita kaj ne necesas urĝa agado.

MISGVIDA ARGUMENTO 1a:
La Tera klimato ŝanĝiĝas ĉiam kaj tio neniel rilatas kun homoj. Eĉ antaŭ la industria revolucio, kiam homoj komencis pumpi karbondioksidon en la atmosferon grandaskale, la Tero spertis pli varmajn periodojn.

KION DIRAS LA SCIENCO?

Estas vere ke la mondo spertis pli varmajn kaj pli malvarmajn periodojn pasintece sen ia influo de homoj. La glaciaj epokoj estas tre konitaj ekzemploj de tutteraj ŝanĝoj de la klimato. Estis ankaŭ regionaj ŝanĝoj tiaj kiaj periodoj konitaj kiel la «Mezepoka Varma Periodo», kiam vinberojn oni kultivis vaste en Anglujo, kaj la «Malgranda Glacia Epoko» kiam la rivero Tamizo kelkfoje glaciiĝis. Tamen, male al ĉi tiuj klimataj fazoj, la altiĝo je tri kvaronoj de grado (0,74ºC) meznombre en tutteraj temperaturoj, kiun oni vidis tra la lasta jarcento estas pli granda ol kiom oni povas klarigi per nur naturaj faktoroj.

La Tera klimato estas komplikata kaj influata de multaj aferoj (konkrete, ŝanĝoj en la Tera orbito rilate al la Suno, kiuj estigis la ciklojn de glaciepokoj pasintece). Efikis ankaŭ vulkanaj erupcioj kaj varioj en la energio elsendata de la Suno. Sed eĉ konsiderante ĉiujn tiujn faktorojn, oni ne povas klarigi la temperaturajn altiĝojn spertataj dum la lastaj 100 jaroj kaj sur tero kaj en maro (ekzemple, dek unu el la lastaj dek du jaroj estis la plej varmaj ekde registroj komencitaj en 1850).



**La vulkanoj eligas nur 1 procenton el la karbondioksido okazigita de la homa agado.**

Nu, kio kaŭzas tiun altiĝon en meza tuttera temperaturo? La gasoj de la natura atmosfera forcej-efiko tenas la Teron ĉirkaŭ 30ºC pli varma ol ĝi estus alimaniere kaj, sen ĝi, la Tero estus treege malvarma. Ĝi funkcias ĉar tiuj gasoj kiaj la karbondioksidoj, metano, sed ĉefe akvovaporo, agas kvazaŭ kovrilo ĉirkaŭ la Tero. Ĉi tiuj gazoj permesas la Sunajn radiojn atingi la Teran surfacon sed malhelpas la varmon kreitan de ili, eskapi revene en la kosmon. Efektive, la kapablon de karbondioksido kaj aliaj atmosferaj forcej-gasoj kapti varmon ĉi tiel oni komprenas de antaŭ 200 jaroj kaj oni ĝin konsideras firme establita scienco.

Ia ajn altiĝo en la niveloj de la gasoj el la atmosfera forcej-efiko signifas ke pli da varmo estas kaptita kaj tutteraj temperaturoj altiĝas (efiko konata kiel «tuttera varmiĝo»). Ni kapablas detekti, pro la gasoj kiuj troviĝas kaptitaj en la interno de polusa glacio, ke la niveloj de karbondioksido en la atmosfero estas nun je 35 elcente pli altaj ol ili estas de antaŭ almenaŭ 650.000 jaroj. El la radioaktiveco kaj ĥemia konsisto de la gaso ni konkludas ke tio estas ĉefe kaŭzita de la bruligado de mondaj arbaroj. La altiĝo de tuttera temperaturo estas konforma kun tio kion la scienco diras al ni pri tio kion ni devus antaŭvidi kiam la niveloj de karbondioksido kaj aliaj gasoj el la atmosfera forcej-efiko altiĝas tiel kiel ili faris.

Oni asertis ke la altiĝinta nivelo de karbondioksido en la atmosfero estas kaŭzita de elsendoj de vulkanoj, sed ĉi tiuj konsistigas malpli ol unu elcento da la elsendoj kaŭzitaj de homaj agadoj.

## MISGVIDA ARGUMENTO 2a

Karbondioksido konsistigas nur malgranda parto el la atmosfero kaj tial ĝi ne povas kulpi pri tuttera varmiĝo.

## KION DIRAS LA SCIENCO?

Karbondioksido konsistigas nur etan kvanton el la atmosfero, sed eĉ per malgrandaj koncentriĝoj ĝi multe influas sur nia klimato.

La karakteraĵoj de la forcej-gasoj kiaj la karbondioksido, signifas ke ili multe sorbas la varmon (afero kion oni povas facile pruvi per simpla laboratoria eksperimento). Kvankam estas pli grandaj koncentriĝoj da aliaj gasoj en la atmosfero kiel nitrogeno, ĉar ili ne havas tiajn kaptajn kvalitojn ili neniel efikas al klimata varmiĝo.

Akva vaporo estas la plej grava forcejgaso. Ĝi nature aperas, kvankam tuttera varmiĝo kaŭzita de homaj agadoj nerekte influos al tiu ekzistanta en la atmosfero pro, ekzemple, kreskinta vaporiĝo el oceanoj kaj riveroj. Siavice, tio kaŭzos aŭ malvarmiĝon aŭ varmiĝon, depende de kiamaniere la akvovaporo formiĝas (ekzemple, laŭ malsamaj tipoj je nuboj).

Homoj aldoniĝis al la efiko de akvovaporo kaj aliaj forcejgasoj nature aperintaj, per pumpado je forcej-gasojn kiel la karbondioksido en la atmosferon, ekzemple, per bruligado de fosiliajn karburaĵojn kaj per senarbigado. Antaŭ ol la industriiĝo, karbondioksido konsistigis ĉirkaŭ 0,03 elcentojn de la atmosfero, aŭ 280 ppm (partojn en miliono).

Hodiaŭ pro la homa influo ĝi estas ĉirkaŭ 380 ppm. Eĉ ĉi tiuj malgrandaj kvantoj rezultigis altiĝon en tutteraj temperaturoj de 0,75ºC (rigardu la misgvidan argumenton 1ª).

MISGVIDA ARGUMENTO 3a

Altiĝoj en niveloj de karbondioksido en la atmosfero estas la rezulto de altiĝintaj temperaturoj, ne male.

KION DIRAS LA SCIENCO?

Estas vere ke la fluktuado de temperaturo kaŭzita de la glaciepokoj siavice, ŝanĝis la nivelojn de karbondioksido en la atmosfero. Tion apogas datumoj el gracikoraĵoj montrantaj ke temperaturaltiĝoj okazis unue, kaj poste ilin sekvis nivel-altiĝoj de karbondioksido, ĝis kelkcent jarojn poste. La motivoj de tio, kvankam ne jam tute komprenitaj, estas parte pro tio ke la oceanoj elsendas karbondioksidon dum ili varmiĝas kaj sorbas ĝin dum ili malvarmiĝas, kaj ankaŭ ke grundo liberigas forcejgasojn dum ĝi varmiĝas. Ĉi tiuj altiĝintaj niveloj de forcejgasoj en la atmosfero poste plialtigas varmiĝon pli, kreonte «pozitivan retroefikon».

Kontraŭ tiu natura procezo, ni scias ke la ĵusa kruta altiĝo de la nivelo de karbondioksido (ĉirkaŭ 30 elcente en la lastaj 100 jarojn) ne estas rezulto el naturaj faktoroj. Tio estas ĉar, per ĥemianalizo, ni povas diri ke plejparto el tiu karbondioksido venis de la bruligado de fosiliaj karburaĵoj. Kaj, kiel montrite en la «misgvida argumento 1ª», karbondioksido el homaj fontoj estas preskaŭ certe kulpa pri plimulta varmiĝo dum la lastaj 50 jaroj. Estas granda evidenteco apoganta tiun klarigon kaj neniom, konfliktanta kun ĝi.

Varmiĝo kaŭzita de atmosferaj forcejgasoj el homaj fontoj povus liberigi pli da forcejgasoj en la atmosfero stimulante naturajn procezojn kaj kreante «pozitivan retroefikon», kiel jam priskribite.

MISGVIDA ARGUMENTO 4a

Datumoj pri temperaturo prenitaj de veterbalonoj kaj satelitoj ne subtenas la teorion de tutplaneda varmiĝo.

KION DIRAS LA SCIENCO?

Veras ke en la fruaj 1990-aj la komencaj taksaĵoj de temperaturoj prenitaj el satelitoj kaj veterbalonoj ne spegulas la temperaturajn altiĝojn spertitaj sur la Tera surfaco. Tamen ĉi tiujn malakordojn oni trovis esti rilataj kun la problemoj pri la maniero kiel la datumojn oni rikoltis kaj analizis kaj ilin nun oni solvis pleje. Nia kompreno de tuttera varmiĝo antaŭvidigas nin ke kaj la malalta atmosfero (la troposfero kie plej-multajn forcejgasojn oni trovis) kaj la surfaco Tera devus varmiĝi pro altiĝintaj niveloj de forcejgasoj en la atmosfero. Samtempe, la malalta stratosfero (la parto de la atmosfero super la «kovrilo» el forcejgasoj) devus malvarmiĝi.

Iuj argumentas ke klimatŝanĝo, kiel rezulto de homa agado, ne okazas ĉar fruaj mezuroj faritaj de satelitoj kaj veterbalonoj ŝajne montris ke preskaŭ neniom da varmiĝo okazas en la troposfero. Tamen tion oni trovis kaŭzita de eraroj en datumoj. Oni trovis, ekzemple, ke satelitoj malrapidiĝis kaj iome falis en orbito, okazigante nekoincidojn en iliaj mezuroj. Ankaŭ diferencoj inter la instrumentoj en malsamaj satelitoj kontraŭdiris (problemo kiun oni trovis ankaŭ ĉe veterbalonoj).

Krome matematika eraro en unu origina analizo de satelitaj datumoj kaŭzis ke ĝi montras malpli da varmiĝo en la troposfero. Tamen, post tio ke oni alĝustigis por konsideri tiujn kaj aliajn aferojn, montriĝis ke la varmiĝo en la troposfero estas tre konforma kun la temperaturaj tendencoj kontrolataj ĉe la Tera surfaco.

Aldone, ĉe la malalta stratosfero montriĝis malvarmiĝo kaj tio konformas al nia kompreno pri kian efikon devus havi tuttera varmiĝo en tiu parto de la atmosfero. Tamen, kelko da tiu varmiĝo ne rilatas kun altiĝintaj niveloj de gasoj el la forcejefiko sed ĝi estas kaŭzita de malsama efiko kiun la homoj faris al la atmosfero: la forkonsumo de la ozona tavolo. La ozono varmigas la stratosferon per kaĝado de la envenanta energio el la Suno. Tiu malgrandiĝo de la ozono havas malbonajn efikojn ankaŭ al aliaj partoj de la atmosfero, kio rimarkigas la gravecon prikonsideri ĉiujn faktorojn rigardante tion, kio okazas al nia klimato.

Estas juste rimarkigi ke en tropikaj regionoj de la mondo estas ankoraŭ kelkaj malakordoj inter tio kion la komputaj modeloj antaŭvidigas al ni rilate al temperaturoj ĉe la surfaco kaj en la troposfero kaj kion ni efektive vidas. Tamen, tiuj malakordoj estas inter la limoj de la verŝajnaj ceteraj malĝustaĵoj de la datumoj kaj la malcerteco de la modeloj.

MISGVIDA ARGUMENTO 5a

Komputaj modeloj prognozantaj la estontan klimaton estas nefidindaj kaj bazitaj sur supozaro.

KION DIRAS LA SCIENCO?

Modernaj klimatmodeloj estiĝis pli kaj pli precizaj por reprodukti kiel la efektiva klimato «funkcias». Ili baziĝas sur nia kompreno de bazaj sciencaj principoj, datumoj pri la klimato kaj nia kompreno de kiel ĝi funkcias. Dank' al la perkomputaj si-

mulaĵoj pri kiel la komponaĵoj de la klimata sistemo (nuboj, Suno, oceanoj, vivantoj, malpurigaĵoj en la atmosfero kaj tiel plu) kondutas kaj interagas, sciencistoj estis kapablaj reprodukti la tutan kurson de la klimato tra la lasta jarcento. Per tiu kompreno de la klimatsistemo, sciencistoj estas tial kapablaj prognozi tion, kio verŝajne okazos estonte, surbaze de pluraj supozoj pri homaj agoj.
Gravas rimarkigi ke komputmodeloj ne povas ĝuste prognozi la estontecon, ĉar estas multaj nekonitaĵoj pri tio kio povus okazi.
Sciencistoj modelas aron da eblaj klimatoj per diversa scenaro pri kiel la mondo «aspektos». Ĉiu sceno postulas malsamajn supozojn pri gravaj faktoroj kiel la ebla kreskiĝo de la monda loĝantaro, kiajn politikojn oni povus preni por trakti la klimatŝanĝon kaj kiom da karbondioksido kaj aliaj forcejgasoj la homoj pumpos en la atmosferon. La rezulta prognozo de la estonta klimato por ĉiu sceno, provizas diversajn eblaĵojn por la temperaturo sed en difinita variejo.
Kvankam la klimatmodeloj nun estas kapablaj reprodukti pasintajn kaj nunajn ŝanĝojn en la tuttera klimato sufiĉe bone, ili ankoraŭ ne estas sufiĉe disvolvigitaj por ĝuste prognozi ĉiujn detalojn de la efikoj kiujn ni povus percepti je regiona aŭ loka nivelo. Tamen, ili donas al ni fidindan gvidilon pri la direkto de estontaj klimatŝanĝoj. La fidindeco daŭre altiĝas pro novaj teĥnikoj kaj teĥnologioj.

## MISGVIDA ARGUMENTO 6a

Ĉio rilatas al la Suno; ekzemple, estas forta ligo inter altiĝintaj temperaturoj sur la Tero kaj la kreskiĝo de makuloj sur la Suno.

## KION DIRAS LA SCIENCO?

Ŝanĝoj en la Suna aktiveco estas unu el multaj faktoroj influantaj la klimaton sed ne povas, ili mem, kulpi pro ĉiuj ŝanĝoj en tuttera meza temperaturo kiujn ni spertis dum la 20a jarcento.
Ŝanĝoj en la Suna aktiveco influas la Teran klimaton laŭ malgrandaj sed signifaj varioj en ĝia intenseco. Kiam ĝi estas en pli «aktiva» fazo (kiel indikite de pli granda kvanto da sunmakuloj sur ĝia surfaco) ĝi elsendas pli da lumo kaj varmo. Kvankam estas evidento de ligo inter Suna aktiveco kaj kelko el la varmo en la frua 20a jarcento, mezuroj el satelitoj montras ke estis tre malgranda ŝanĝo en baza Suna aktiveco dum la lastaj 30 jaroj (eĉ evidentiĝas detektebla malkresko) kaj tial tio ne povas kulpi pri la ĵusaj altiĝoj kiujn ni spertis en tutplanedaj temperaturoj.
La grandecon kaj ŝablonon de ŝanĝoj de temperaturoj oni povas kompreni nur konsiderante ĉiujn koncernajn faktorojn (kaj naturajn kaj homajn). Ekzemple, grandaj vulkanaj erupcioj efikas malvarmige ĉar ili disigas cindron kaj aliajn partiklojn en la atmosferon kie ili restadas dum kelkaj jaroj kaj malpliigas la Sunan energion atingantan la Teran surfacon. Same, pro bruligado de fosili-karburaĵoj oni produktas partiklojn nomitajn sul-fataerosoloj kiuj kontribuas malvarmigi la klimaton.
Dum la unua parto de la 20a jarcento niveloj pli altaj de Suna aktiveco kombiniĝis kun kreskoj de hom-generita karbondioksido por altigi temperaturojn. Inter 1940 kaj 1970 la karbondioksidan efikon eble kompensis la kreskantaj kvantoj da sulfataerosoloj en la atmosfero, kaj la etan kvietiĝon en la Suna aktiveco, kaj ankaŭ la vigliĝinta vulkana aktiveco.
Dum tiu periodo tutteraj temperaturoj falis. Tamen, en la lasta parto de la 20a jarcento temperaturoj klare plialtiĝis super la niveloj de la 1940-aj. Fortaj rimedoj estigitaj por malkreskigi sulfatan malpuron en kelkaj regionoj de la mondo igis ke industriaj aerosoloj komencis malpli kompensi la kreskantan varmiĝon kaŭzitan de karbondioksido. La altiĝintan temperaturon dum tiu periodo parte malfortigis kelkfojaj vulkanaj erupcioj.

## MISGVIDA ARGUMENTO 7a

La klimaton efektive afektas kosmaj radioj.

## KION DIRAS LA SCIENCO?

Oni ankoraŭ ne tre bone komprenas ĉiujn efikojn de la kosmaj radioj sur la klimaton; sed, se estas ia efiko, verŝajne ĝi estas malgranda. Kosmaj radioj estas rapidaj moviĝantaj partikloj venantaj el la kosmo, kaj liberigas elektrajn ŝargojn en la atmosferon.
Eksperimentoj faritaj en laboratorio sugestas ke kosma radiado povus ludi rolon en la disvolvo de malgrandegaj partikloj kiuj siavice povus partopreni en la formiĝo de la nuboj. Se tio okazus same en la atmosfero (kion oni ne pruvis) ĝi povus konduki al pli da nuboj, kio ĝenerale efikas malvarmige pro reflektado de la Sunaj radioj ree en la kosmon. Ĉu la tuta ĉeno de procezoj efektive okazas en la atmosfero estas spekulacio, sed kelkaj el la unuopaj paŝoj estas kredindaj.
Oni suponis ke tiu procezo agus por grandigi la influojn de la Suno sur la klimaton. Ni scias ke kiam la Suno estas pli aktiva ĝia magneta kampo estas pli forta kaj tio deturnas kosmajn radiojn foren de la Tero. Tial la argumento estas ke pli aktiva Suno igas ke malpli da kosmaj radioj atingus la Teron, do formiĝas malpli da nuboj kaj tial la Tero plivarmiĝas. Tamen, esplorado de nuboj kaj galaksiaj kosmaj radioj montras ke, maksimume, la ebla

ligo inter kosmaj radioj kaj nuboj efikas nur malmulte. Kvankam oni pruvus ke kosmaj radioj efikas pli grave, la nivelo de Suna aktiveco ŝanĝiĝis tiel malmulte dum la lastaj jardekoj, ke la procezo ne povus klarigi la ĵusajn altiĝojn en temperaturo kiujn ni vidis.

MISGVIDA ARGUMENTO 8a

La skalo de la negativaj efikoj de la klimatŝanĝoj estas ofte troigita kaj neniel necesas urĝa agado.

KION DIRAS LA SCIENCO?

Laŭ iu el ĝiaj mezvariejaj taksoj (rigardu misgvidan argumenton 5an pri komputmodeloj) la Interregistara Ĵurio pri Klimat-Ŝanĝo (IPCC laŭ la anglaj komencliteroj, la monda ĉefa aŭtoritato pri klimatŝanĝo) prognozis altiĝon en tuttera meza temperaturo ĉi tiun jarcenton de 2 al 3ºC. Tio signifas ke la Tero spertos klimatŝanĝon pli grandan ol ĝi spertis dum almenaŭ 10.000 jaroj.

Estus malfacile ke multaj homoj kaj ekosistemoj adaptiĝu al la efiko de tiu ŝanĝo. Post ne longe, kelkaj partoj el la mondo povus komence profiti el klimatŝanĝo. Ekzemple, la plej nordaj regionoj el la mondo povus sperti pli longajn sezonojn por kresko de la rikoltaĵojn, kaj produktokvanto povus kreski ĉar altiĝintaj niveloj de karbondioksido en la atmosfero efikus fekundige al la plantoj.

Tamen, la IPCC atentigis ke dum la klimatŝanĝo progresas, estas verŝajne ke negativaj efikoj komencus regi preskaŭ ĉie. Altiĝantaj temperaturoj verŝajne, ekzemple, altigus la frekvencon kaj severon de veteraĵoj, kiel varm-ondoj, ŝtormoj kaj inundoj. Aldone, estas efektivaj zorgoj ke, post longe, altiĝintaj niveloj de forcejgasoj en la atmosfero povus ekmovi grandskalajn kaj abruptajn ŝanĝojn en la naturaj sistemoj de nia planedo kaj iuj el ili povus esti neinversigeblaj. Altiĝintaj temperaturoj povus, ekzemple, fandi grandajn glacipecojn kun gravaj sekvoj por malaltaj areoj en la mondo. Kaj la efikoj de la klimatŝanĝo falus neproporcie sur la evoluintajn kaj la evoluontajn landojn, tio estas, sur la riĉaj kaj la malriĉaj (tiuj kapablaj elspezi malpli por adaptiĝi). Tial ŝanĝanta klimato pliakrigos la malegalecon, ekzemple, en sano kaj alireblo al adekvata manĝaĵo kaj pura akvo.

KONKLUDE

Nia scienca kompreno de la klimatŝanĝo estas sufiĉe solida por tre certigi nin pri tio ke la forcejgasaj elsendoj estas kaŭzantaj tutteran varmiĝon. La scienco antaŭeniras per defio kaj debato, kaj tio daŭros. Tamen, neniu nuna kritiko de priklimata scienco nek alternativa klarigo pri tuttera varmiĝo estas sufiĉe bone bazita por igi ke la saĝa elekto estas agi neniel.

La scienco klare indikas la bezonon ke la nacioj agu urĝe por ĉesigi la forcej-gasajn elsendojn en la atmosferon, kiel eble plej multe kaj rapide, por malgrandigi la plej akrajn aspektojn de la klimatŝanĝo. Ni devas pretiĝi ankaŭ por la sekvoj de la klimatŝanĝo, el kiuj, kelkaj jam estas neeviteblaj.

DANKO

Ĉi tiun dokumenton oni kompilis helpe de la Konsila Grupo de la Reĝa Societo pri la Klimata Ŝanĝo, kaj aliaj ĉefaj spertuloj.





La homa aktivado liveras en la atmosferon karbondioksidon kaj aliajn venenigajn gasojn kiuj riskas okazigi ne renverseblan damaĝon en la klimato.

# Kuirante kun Pilar



## Fazeolaĵo de la hortisto

**Ingrediencoj**: 300 gramoj da blankaj fazeoloj, unu cepo, unu kapsiko, unu tomato, 330 gramoj da kukurbo, 300 gramoj da spinacoj, laŭro-folieto, salo, pipro, oliv-oleo.

**Ellaborado**: Oni devas haketi la cepon kaj poste stufi ĝin ene de pato kune kun iomete da oleo, aldoni poste la kapsikon kaj la tomaton tranĉitan popece kaj iomete da papriko.
Sekve oni procezas ĉion per kirlilo.
En bol-poto entenante la akvon kaj la laŭro-folion, oni devas kuiri la fazeolojn kaj meze de tiu procezo oni aldonu la tomat-saŭcon. 20 minutojn antaŭ la finiĝo de la kuirado oni devas aldoni la popece tranĉitan kukurbon kaj la spinacojn. Oni aldonu salon laŭ la proporcio kutima de la kuiranto.

## Pom-kompoto kun vanila glaciaĵo

**Ingrediencoj**: 3 **golden**-pomoj, 2 kuleroj da bruna sukero, unu branĉeto el cinamo, 4 buloj da vanila glaciaĵo, 2 kuleroj da haketitaj migdaloj.

**Ellaborado**: Oni rostigu ene de forno dum kelke da minutoj. Post senŝeligi la pomojn kaj forigi ties koron, oni tranĉu ilin popece. En ĉerpil-vazo oni metu pecojn el pomo kune kun la sukero, cinamo, kaj duon-glaso da akvo. Kuiri ĉion per malforta fajro dum 8 al 10 minutoj.
Post la malvarmiĝo de la maso oni povas aldoni al ĝi la glaciaĵon kaj la muelitajn migdalojn.





# templanoj

## DE POST SEP JARCENTOJ


Vendrede, la 13an de oktobro de la jaro 1307, do, antaŭ preskaŭ ĝuste sep jarcentojn, en la tuta regno de Francio kaj laŭ ordonoj de la tiama reĝo de tiu lando, Filipo la 4a, la reĝaj trupoj, en kombinita kaj samtempa operacio, invadis ĉiujn kastelojn kaj komandorejojn de la ordeno de la templanoj aŭ templ-kavaliroj. Jacques de Molay (Jaks de Mole) PlejSuperulo de tiu ordeno, kaj 140 el tiuj monaĥ-soldatoj estis subite kaj neatendite arestitaj kaj poste submetitaj al torturado kiu igis ke ĉiuj akuzitoj sin deklaris kulpaj je ĉiu-tipa sekreta krimo: herezo, samseksemeco, sodomio, idol-adorado, sakrilegio kontraŭ la kruco…
La sekvinta juĝ-proceso kulminis per la nuligo de la ordeno kaj la konfisko, pere de la reĝo, de ĉiuj bienoj, konstruaĵoj kaj havaĵoj en la regno de Francio. Poste sekvis simila agado en aliaj regnoj kie ekzistis templ-kavaliroj: Anglio, Hispanio, Portugalio, Italio, Germanio… La afero alvenis al sia finiĝo sep jarojn poste, konkrete la 18an de marto de la jaro 1314, kiam Jacques de Molay kaj aliaj templanoj, kiuj sin deklaris senkulpaj forĵurante sian antaŭan kulp-akcepton, estis bruligitaj en publika inkvizicia ekzekuto en la centro de Parizo. Aliaj mortis dum aŭ post la torturado, kaj aliaj restis en malliberejo dum la cetero de ilia vivo. En aliaj landoj, for de Francio, la punoj estis malpli severaj; ĝenerale la templ-kavaliroj estis devigitaj eniri en aliajn religiajn ordenojn, kaj la riĉaĵoj de la Templ-Ordeno ne ĉiam nek tute estis alpropriigitaj de la reĝoj sed transdonitaj al aliaj ordenoj. Kiu plej profitis el tiu havaĵ-transdono estis la ordeno de la Hospital-gardistoj, ordeno ĝemela de la templana, kiu ankoraŭ ekzistas sub la nomo de "Ordeno de Malto". En Hispanio le heredintoj de la Templ-Ordeno estis tiuj nomataj: Santiago, Alcántara, Calatrava, Montesa… En Portugalio estis tiam kreita la Ordeno de Kristo por ricevi la membrojn kaj la havaĵon de la estingigita Templ-Ordeno.
Sed, kiuj estis tiuj kavaliroj kiuj tiom altiris tiam la malamikecon de la reĝo de Francio, Filipo la 4a, kaj de la tiama Papo, Klemento la 5a, kiu subskribis la nuligon de ordeno kiu ĝis tiam estis la ĉefa armeo de la Eklezio en la batalado kontraŭ la muzulmanoj? Kaj, kiel oni alvenis al tiu stranga situacio?
La Templ-Ordeno havis duoblan karakteron: religia kaj militista; ĝi estis kreita post la Unua KrucMilito. La fondiĝo okazis en Jerusalemo en la jaro 1118, kaj la iniciatintoj estis naŭ francaj kavaliroj subgvide de Hugo de Payns. Rezulte de tiu krucmilito, en kiu la kristanoj de Okcidenta Eŭropo konkeris Jerusalemon kaj ampleksan teritorion ĉirkaŭ ĝi, estis kreita la Regno de Jerusalemo. La konkerinto de la urbo, Godofredo de Bouillon estis la unua reganto de de tiu Regno sed ne volis preni la titolon de Reĝo. Post lia baldaŭa morto, lia nevo kaj heredinto prenis la reĝan titolon sub la nomo Balduino la Unua. Estis dum la

reĝado de Balduino kiam la menciitaj naŭ kavaliroj entreprenis la kreadon de ordeno kies celo estis la defendo de la sanktaj lokoj de la kristanismo kaj de la pilgrimantoj alirantaj al tiuj lokoj.









Komence ĝi nomiĝis **Ordeno de la Malriĉaj Kavaliroj de Kristo (*Pauperes Conmilitones Christi*)**. Estis tre necesaj al la reĝo Balduino tiaspecaj trupoj ĉar post la finiĝo de la krucmilito la kavaliroj partoprenintaj en ĝi revenis al iliaj loĝlokoj en Eŭropo kaj la nova kristana regno restis preskaŭ sendefenda. Do li asignis al la nova ordeno iujn konstruaĵojn kiuj troviĝis ĝuste en la loko kie iam, antikve, troviĝis la fama templo de Salomono. Tio igis ke poste tiuj monaĥo-soldatoj estis konataj laŭ la nomo de **Kavaliroj templanoj** aŭ **Kavaliroj de la templo de Salomono *(Milites Templi Salomonis)***.

La nova ordeno jam dekomence atingis la apogon de la reĝoj de Eŭropo kaj de la Eklezia Hierarkio. En Koncilio kunvokita tiucele, en la franca urbo de Troyes, oni redaktis la statutojn aŭ regularon de la ordeno kaj oni difinis la uniformon aŭ monaĥ-kostumon de la ordeno-membroj: blanka mantelo kaj ruĝa kruco sur ĝi. Menciindas ke ĉi tiu de la templanoj ne estis la unua je tiu tipo. De antaŭ kelkaj jaroj ekzistis jam la menciita Ordeno de la Hospitalanoj. Fakte, la regularo aŭ statutaro estis la sama por ambaŭ ordenoj, kaj la uniformo de la hospitalanoj havis samajn kolorojn ol ties de la templanoj, sed inverse disponitaj, t.e. ruĝa mantelo kaj blanka kruco sur ĝi. La celo de la hospitalanoj estis atenti pri la sano kaj loĝado de la pilgrimantoj al Jerusalemo. Ambaŭ ordenoj, rivalaj kaj kunlaborantaj, estis konsideritaj kvazaŭ ĝemelaj.


En la jaro 1128 la Papo Honorio la 2a aprobis la Templ-Ordenon kaj de tiam tre rapide kreskis la nombro de la kavaliroj apartenantaj al ĝi. La membroj de la ordeno plejmulte estis el Francio; tiurilate la Templ-Ordeno povas esti konsiderata kiel franca ordeno, sed ne ekskluzive, ĉar venis ankaŭ rekrutoj el la regnoj de Britio, Skotlando, Aragono, Kastilio, Portugalio…



Laŭ papaj buleoj la templ-kavaliroj havis kelkajn privilegiojn; ili estis efektive aŭtonomaj rilate al la episkopoj, dependante nur de la Papo. Ili estis ankaŭ for de la jurisdikcio de la civilaj aŭtoritatoj. Ili povis ricevi monon kaj bienojn. Krome ili rajtis konstrui proprajn kastelojn kaj preĝejojn, kaj superregi la teritoriojn kiujn ili konkeris en la t.n. Sankta Lando. Ĉio ĉi, laŭlonge de la tempo, permesis al ili akiri grandan povon kaj riĉaĵojn.

Ĉirkaŭ la jaro 1170, kvindek jarojn post la fondiĝo de la Templ-Ordeno, ĝi havis posedaĵojn en Francio, Germanio, Britio, Hispanio kaj Portugalio. Tiu teritoria disvastiĝo kontribuis al la pligrandiĝo de la riĉaĵoj de la ordeno ĉar ĝi oferis al la komercistoj en Sankta Lando deponi sian monon en iun templanan komandorejon kaj per iu kvitanco de la ordeno retrati ĝin en alia komandorejo, enspezante la ordeno la koncernan makleraĵon, laŭ funkciado simila al de la nuntempaj bankoj.

Post kromaj kvindek jaroj, ĉirkaŭ la jaro 1220, la templanoj konstituis la plej grandan ordenon en Okcidento, ĉiusence, kaj de militista kaj de ekonomia vidpunkto, kun pli ol 9.000 komandorejoj dislokitaj en tuta Eŭropo, proksimume 30.000 kavaliroj kaj pli ol 50 kasteloj en Eŭropo kaj MezOriento, propra ŝiparo kaj riĉa trezoro kiu permesis al ili fari grandajn pruntojn al la eŭropaj Reĝoj.

Krom la plenumado de sia specifa tasko klopodi la sekurecon de la



pilgrimantoj, La Templa Ordeno konstituis gravan parton el la armeo de la Reĝoj de Jerusalemo. La templanoj partoprenis dum preskaŭ du jarcentoj en ĉiuj militoj kontraŭ la muzulmanoj. Kiam la armeo de Jerusalemo marŝadis, la templ-kavaliroj konstituis la avangardon de tiu armeo, dume la hospitalanoj marŝadis ĉiam en la malantaŭo de la sama armeo. Poste fondiĝis en Eŭropo, konkrete en Germanio, alia simila ordeno de monaĥo-soldatoj, tiu nomata Teŭtona Ordeno. Ĝia celo estas kontribui al la kristanigo de la orienta zono de Eŭropo batalante kontraŭ la tieaj paganoj, sed tamen estis ankaŭ teŭtonaj kavaliroj en Sankta Lando. Dume estis templanoj ankaŭ en Hispanio kaj Portugalio, kie tiam oni bataladis kontraŭ la muzulmanoj.


La epoko de la Sultano Saladino estis misfortuna kaj por la kristana Regno de Jerusalemo kaj por la ordeno de la templanoj. En la jaro 1244 Saladino konkeris Jerusalemon kaj de tiam la kristanoj kontrolis nur malgrandan terpecon en Sankta Lando.

Tiam la templo-kavaliroj devis sin retiri al la fortreso de **Sankta Johano de Akre** kune kun la du aliaj ordenoj. Okazis pliaj krucmilitoj celante rekonkeri Jerusalemon. Kelkaj reĝoj el Francio kaj Britio, kaj Germanaj imperiestroj partoprenis kaj gvidis tiujn militojn. Iuj el tiuj ekspedicioj estis katastrofaj por la kristanaj armeoj; aliaj atingis pli feliĉan rezulton kaj gajnis grandajn batalojn. Sed ne eblis reakiri Jerusalemon kiel ĉefurbon de la kristana regno en Sankta Tero. Fine la venko de iu germana imperiestro en la lasta krucmilito atingis ke oni permesis al la kristanoj denove loĝi en Jerusalemo sed ne fortikigi la urbon nek fari el ĝi la reĝurbon de la kristana regno.

Tiam neatendite aperis grava ŝanĝo en la situacio en Oriento. Okazis la invado de la mongoloj de Ĝingis-Ĥano. En Orienta Eŭropo, kie la mongoloj alvenis ĝis Polujo, ili okazigis grandan detruadon kaj mortigon. Same okazis en la muzulmana Mezorienta terzono. La mongoloj detruis la muzulmanan sultan-regnon de Bagdado. Ili ne malamikis al la kristanoj de Sankta-Tero; ŝajnas ke plejparto el la anoj de la mongola armeo estis kristanoj nestorianoj el kiuj tre abundis en Azio. Sed antaŭ ili fuĝ-marŝadis senorda hordo da gentoj, ĉefe hindaj, el la popoloj venkitaj kaj detruitaj de la mongoloj. Tiu hordo, simila al tiu de la ciganoj de Eŭropo, de sama origino kaj deveno, alveninte al Jerusalemo ekstermis la tiean kristanan loĝantaron. Poste alvenis la mongoloj mem kaj detruis ĉiun muzulmanan regnon kaj aŭtoritaton; tiu mongola ondo alvenis ĝis Egiptujo sed tute ne atakis la mallarĝan kristanan franĝon de la marbordo ĉirkaŭ **Akre**. La tieaj kristanoj ne sciis eltiri profiton el tiu stranga situacio sufiĉe favora al ili. Fakte, ili estis dividitaj; estis tiam du dinastioj kiuj disputadis unu la alia la reĝecon de Jerusalemo. Estas klara signo de la krizo de tiu regno la fakto de dum la hospitalanoj apogadis iun el la pretendantoj, la templanoj subtenadis la alian. La rilatoj de ambaŭ kristanaj ordenoj tiam estis pli je kontraŭeco kaj malamikeco ol je kunlaborado.

Poste renversiĝis la situacio. Mortinte Ĝingis-Ĥano, liaj posteuloj kverelis pri la heredaĵo. Fine superstaris lia nepo Kubilaj-Ĥano, sed ĉi tiu sin dediĉis al la konkerado de Ĉinio kaj malatentis pri la aferoj de Okcidento. Tiam la muzulmanoj de Mezoriento reakiris sian antaŭan potencon kaj adresiĝis kontraŭ la kristanoj de **Sankta Johano de Akre**. Tiu ĉi urbo falis en la jaro 1291 sub la povo de la

muzulmanoj kaj estis ekstermita la tiea templana garnizono. La kristana ĉeesto en Sankta Tero finiĝis kaj jam ne plu estis kruc-militoj.
La templanoj intencis ekde Kipro organizi novan Kruc-militon. Fakte, ŝajnas ke kiam Jacques de Molay estis arestita en Francio, li troviĝis en tiu lando por konvinki la reĝon cele de entrepreni tian militon. Sed en Eŭropo estis ŝanĝiĝinte la penso-maniero kaj tiam ekzistis neniu povo interesita pri la rekonkero de la sanktaj lokoj.
Tiam la Templ-Ordeno estis riĉega, sed la sola celo de ĝia ekzistado, laborado kaj batalado estis partopreni en entrepreno kiu jam devos ne plu okazi. La devizo de la ordeno estis: ***Non nobis, Domine, Non Nobis, Sed Nomine Tuo Da Gloriam*** (Ne nin, Sinjoro, ne nin sed al Via Nomo donu Gloron). Nun oni ne povas scii ĉu ili estus kapablaj adaptiĝi al la nova situacio, sen kruc-militoj, kiel faris la aliaj ordenoj. Sed ĉiukaze ili ne havis okazon fari la provon. La atako de la Reĝo de Francio kaj poste la nuligo de la ordeno fare de la Papo trunkis ĉiun esperon de la ordeno pri la estonteco.
Filipo la 4a de Francio tre estis enŝuldita kun la templanoj, kaj krome la ordeno estis granda obstaklo por la forta reĝa kaj ŝtata povo kiun tiu monarĥo volis konstrui. Kun la helpo de lia kanceliero Vilhelmo de Nogaret kaj la Ĝenerala Inkvizitoro de Francio Vilhelmo Imberto, la franca reĝo konvinkis la Papon Klementon, kiu ŝuldis al li la pap-nomumon, entrepreni juĝ-proceson kontraŭ la templ-kavaliroj.
Sed spite al ĉiuj klopodoj de Filipo la 4a kaj ties ministroj la kulpeco de la Templ-Ordeno ne povis esti pruvita, kaj la Papo iome rezistis la reĝan premon kaj eĉ nuligis la juĝon. Fine li rezignis pri lia rezistado kaj kvankam ne akceptis la kulp-sentencon li decidis, tamen, la nuligon, ne la kondamnon, de la ordeno uzante la absolutan povon atribuitan al la Eklezia Ĉefpontifiko.
La Papo devis decidi pri la destino de la PlejSuperulo de la ordeno kaj ties tri ĉefaj helpantoj, kiuj estis konfesintaj sian kulpecon. Restis nur repacigi ilin kun la Eklezio post ilia atestado pri pento. Por soleni tiun akton oni muntis platformon antaŭ la Katedralo de ***Notre Dame*** por la legado de la sentenco, sed en la suprema momento Jacques de Molay reakiris sian kuraĝon kaj proklamis la senkulpecon de la templo-kavaliroj kaj la malveron de liaj propraj supozitaj konfesoj. Same faris alia el liaj subuloj. Ili estis tuj arestitaj kaj kondamnitaj al la bruligejo la 18an de marto de la jaro 1314.
Per tio kaj la posta aplikado de la papa dispono pri la nuligado de la ordeno en ceteraj landoj krom Francio, kulminis la malapero de la Templ-ordeno el la historio.
La templanoj eliris el la historio kaj eniris en la legendon. Hodiaŭ ekzistas pli ol 300 organizaĵoj el ciuj tipoj kiuj sin deklaras sekvantoj kaj daŭrigantoj de la templ-kavaliroj kaj ties ordeno. Krome en multaj verkoj dediĉitaj al la templanoj kaj ties historio oni atribuas al ili krom kolosaj trezoroj, grandan konon pri diversaj aferoj. Iuj asertas ke la floto de tiuj kavaliroj alvenis al Ameriko du jarcentojn antaŭ Kristoforo Kolombo. Aliaj deklaras ke ili malkovris dum lia loĝado en Jerusalemo la biblian Keston de Interligo kaj/aŭ la grialo de la sango de Kristo, aŭ iaj magiaj povoj…Oni diras, ankaŭ, ke la framasonaro estas ia formo de pluvivado de la templ-kavaliroj. Eble temas pri fantaziaĵoj ne malpli grandaj ol la krimoj kiujn atribuis al ili Filipo la 4a kaj ties lakeoj.









# LA ESPERANTISTARO KONGRESAS

























Ĉiujare la Esperantista Movado atestas pri ĝia ekzistado tra la tuta mondo pere de kongresoj kaj kunvenoj kiuj kunigas homojn el malsamaj landoj, lingvoj kaj kulturoj. La flua interkomunikado inter tiom da malsamlingvanoj montras la taŭgecon de la Internacia Lingvo por la celo kiu inspiris ĝian kreadon.

Okazis multaj el tiuj esperantistaj forumoj ankaŭ ĉi-jare, 120 jarojn post la eldonado de la unua gramatiko de Esperanto. Ekde tiam pasis longa tempo kaj rigardante la nunan staton de Esperanto en la mondo, oni povas pensi, ke ĝi ne estas tio, kion meritas la Internacia Lingvo. Kelkaj aferoj malhelpis la disvastiĝadon de Esperanto en la pasinta tempo, sed la estonteco dependas ankaŭ de ni.

Ĉu nia maniero kongresi estas efika propagandilo pri la taŭgeco kaj utileco de la lingvo kreita de Zamenhof? Laŭŝajne niaj kongresoj kaj ceteraj aktoj favore al Esperanto restas kvazaŭ internaj agoj de fermita kolektivo (eĉ se dislokita tra la tuta terglobo) kies ekzisto kaj aktivado ne estas perceptata de la granda publiko.

La esperantistaro devas ekkonscii pri la neceso je renoviĝo en la tereno de la propagando. La kongresoj de nia movado, same ol alitipaj kongresoj, konferencoj k.s. funkcias laŭ formoj kaj skemoj kiuj estis konceptitaj jam antaŭ du jarcentoj. Ŝajne, nun ili havas neniun efikon sur la socio.

La kongresoj atestas pri la taŭgeco kaj preteco de la ilo de komunikado, sed la mondo ne ĉeestas niajn kongresojn por testi la efikon de nia lingva solvo. Tiun efikon devas esti montrata kaj pruvata tie, kie ekzistas lingvaj problemoj, kaj homaj kolektivoj spertas kaj suferas tiujn problemojn.




















# 66a Hispana Kongreso de Esperanto

La 66a Hispana Kongreso de Esperanto okazis, samtempe kaj samloke ol la 12a Andaluza Kongreso de Esperanto, de la 5a ĝis la 8a de julio, en Palos-de-la-Frontera (Onubo). Spite al ties malgranda daŭro de la kongreso, okazis en ĝi plejparto el la aktoj de la kongresa ritualo: Solenaj Inaŭguro kaj Fermo, prelegoj, prilingvaj programeroj, muzik-koncertoj, asociaj kunsidoj, turismaj vizitoj kaj ekskurso, ekspozicio, filmoj, libroservo…

En la Inaŭguro, kiun ĉeestis la urbestro kaj la urbkonsilantino pri Kulturo, kaj pri kiu informis la loka televido, estis la kutima salutado de la landaj delegacioj kaj ĉeestantaj eksterlandanoj. Estis ankaŭ legado de salut-mesaĝo de Ludoviko Kristoforo Zaleski-Zamenhof, nepo de la aŭtoro de Esperanto. Estis ankaŭ salut-mesaĝo de Renato Corseti, Prezidanto de **Universala Esperanto Asocio**. Ĉeestis la kongreson, pri kiu iome informis kelkaj lokaj ĵurnaloj, 85 personoj, inter ili 12 eksterlandanoj.

Estis kelkaj prelegoj. Francisko Simonet prelegis pri la temo "Liberon por la lingvoj" per kiu li postulas konservi kaj respekti ĉiujn minoritatajn lingvojn. Post prezenti la asocion "Libero por la lingvoj" li mallonge prelegis pri kelkaj problemoj de la komenca Esperanto-movado. Zlatko Tišljar temis en sia prelego pri la grava rolo de la lingvo en la identeco de la kolektivoj kaj asertis ke nur per komuna neŭtrala lingvo kia Esperanto eblos ia Eŭopa identeco, sed ke, tiukaze, Esperanto ne plu povos esti universala. Grazina Opulskienié, prelegis pri la temo "La virinoj en la Esperantista Movado".

Miguel Gutiérrez Adúriz, prezentis novan instruometodon, ankoraŭ en provo-periodo. Laŭ tiu metodo, la lernado devas okazi intuicie, ne per libroj kaj gramatiko. Li prezentis ankaŭ sian novan vortaron, nomata ***Amika***. La komputilisto José Carlos Cuevas prelegis pri la tradukado esperanten de la operaciumo Linukso (Linux), kaj pri redaktado de artikoloj en Vikipedio.

Augusto Casquero, prezidanto de Hispana Esperanto Federacio, projekciis fotojn el sia ĵusa vizito al Ĉinio kaj raportis pri tiu lando kaj lia vizito al ĝi. Estis ankaŭ prelego de Fabián Jiménez pri la E-movado.

Roman DobrzyDski, pola fakulo pri televido, prezentis kelkajn siajn filmojn, kiuj estis en Esperanto sed kiuj komence estis pol-lingvaj destine al la televido de tiu lando. La temaro de parto el la filmoj estas hispana; iliaj titoloj: ***Sevilla Maravilla***, ***Valencio en Fajro***, ***Chopin revenas al Majorko***,

Inter la prilngvaj programeroj estis la kurseto de la slovena Djorge Obradovich pri transitiveco de la verboj en Esperanto. Same, la parolado de Francisko Simonet Tišljar pri la kunmetitaj verboformoj. Aŭgusto Casquero instruis pri la E-prepozicioj, kaj Grazina Opulskienie gvidis lecionojn per Cseh-Metodo, por komencantoj, en kiuj la komunikado okazas nur en Esperanto helpe de bildoj, objektoj kaj signoj.

Krom tio okazis la ekzamenoj pri Esperanto, kutimaj en ĉiuj landaj kongresoj de nia movado. Alia kutima kongresa programero estas la kunsidoj de esperantistaj asocio. En Palos okazis tiuj de HEF kaj AEU (Andaluzia Esperanto-Unuiĝo).

Inter la lud-programeroj mencieblas unue, la muzikaj koncertoj de flamenka grupo, de la kantisto "Solo" kaj de la kaŭkazia geparo Ĵomart kaj Natasha kaj ties filino Karina, kaj due la turismaj vizitoj al la urbo kaj ekskurso al Punta Umbría (ekster la kongresa programo). Dum la kongresaj tagoj estis ekspozicio de ceramikaĵoj de Francisca Alonso kaj Chata Torrades.

Kadre de la kongreso estis ankaŭ omaĝo al Alfonso Escamilla, 94-jara eminenta esperantisto, profesoro, muzikisto, pentristo kaj aŭtoro de tre interesa verko pri la internacia lingvo, loĝanta en la urbo Linareso.

Fine, ni transskribas la kongresajn konkludojn:

1. Esperanto, pro sia neŭtrala karaktero, povas havigi lingvan identecon al la parolantoj de la Eŭropa Unio, respektante la rajton de ĉiuj lingvoj kunekzisti en plano je egaleco. Ni daŭrigos niajn strebojn por antaŭenigi sian uzadon kaj agnoskon.
2. La novaj teknologioj, ĉefe interreto, revoluciigas la esperantismon, kaj antaŭenpuŝas la diskonigon de Esperanto inter la junularo el la tuta mondo. Oni devas plilarĝigi la uzadon de ĉi tiuj teknologioj.
3. Ni lanĉas la ideon okazigi denove Universalan Kongreson en Hispanio.

FEDERACIÓN ESPAÑOLA DE ESPERANTO




La 92a Universala Kongreso de Esperanto ĉi-jare okazis en la japana urbo de Jokohamo dum la tagoj 4 al 11 de aŭgusto. Ĉeestis ĝin 1900 geesperantistoj el pli ol 50 landoj.

En la solena Inaŭguro de la Kongreso, la vicurbestro de la urbo laŭtlegis la bonvenigan mesaĝon de la urbestro Nakada Hirosi. Sekve oni legis mesaĝon de L.C.Zaleski-Zamenhof. La nepo de L.L.Zamenhof diris:

Estimataj Gekongresanoj, Geamikoj karaj, alvenintaj al Jokohamo el ĉiuj partoj de nia planedo, akceptu la tradician Zamenhofan saluton! Vi reunuiĝis por ĝui la sen-egalan, neforgeseblan etoson de niaj kongresoj kaj por debati i.a. pri la akcepto de Okcidento en Oriento aŭ pri rezisto tiurilata.




Tiu elektita kongresa temo aperas urĝe aktuala en nia epoko de tutmondiĝo. Fakte, unu jarcenton post nia unua Universala Kongreso, kiam "...inter la gastamaj muroj de Bulonjo-sur-Maro kunvenis ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj...", nun, citante la vortojn de nia Prezidanto, "... homoj kun homoj tie ĉi reunuiĝantaj venas ne nur de Eŭropo sed de plej diversaj kultur-regionoj de la mondo".

Mi, persone, estante inĝeniero de pontoj, ege ŝatus kontribui al konstruo de pontoj de interkompreno kaj de akcepto reciproka inter Oriento kaj Okcidento. Dum mia profesia kariero, plurajn jarojn mi funkciis kiel konsilisto ĉe mondfama Tokia konstrufirmao. Tiam, dum miaj oftaj restadoj en via lando, mi spertis persone la akcepton de Oriento: mi ĝuis amikecon de miaj tiamaj kunlaborantoj, mi estis kore akceptata en iliaj hejmoj, konatiĝis kaj amikiĝis kun iliaj gefamilianoj...

...Tamen, kontraŭe al miaj personaj spertoj, mi konscias ke la rezisto inter Oriento kaj Okcidento certe ankoraŭ ne malaperis. Ĝi rezultas de malkompreno ne nur de lingvo sed ankaŭ de kutimoj kaj ĝenerale de kulturoj malsamaj. Por venki tian reziston ni devas esti armitaj de toleremo ambaŭflanka. Estas ja la idealo de toleremo, kiu antaŭ cent dudek jaroj naskis nian Lingvon Internacian, por ke ĝi faciligu la komprenon de la diverseco kaj sekve la akcepton de tiu diverseco – de diverseco, sekve de multnombro de kulturoj, kontribuanta al la spirita riĉeco de la homaro.

Ni esperantistoj kontribuas per nia agado al la akcepto kaj ni kontraŭbatalas la reziston inter Oriento kaj Okcidento. Mi forte deziras al via Kongreso, ke ĝi estu grava paŝo sur la vojo kondukanta al tiu nobla celo.

Kiel kutime okazas en la Universalaj Kongresoj de Esperanto, estis multaj salutoj kaj mesaĝoj el diversaj gravuloj el la mondo. Kompreneble, en ĉi tiu modesta raporto oni ne transkribas ĉiujn ĉi mesaĝojn, sed ni pensas ke indas transkribi la tekstojn kiun la Kongreso ricevis el la urbo Hiroŝimo, la unua kiu ricevis atakon per atom-bombo:

**Antaŭ 62 jaroj, en la 6-a de aŭgusto, je 08:15 sur Hioroŝimon falis atom-bombo. Ĝis nun konserviĝis nur unu detruita konstruaĵo, atestanta pri la tragedio, kiu nun konsistigas la Hiroŝiman Pacan Muzeon. La Muzeo baziĝas sur la nocio, ke nuklea armilaro neniam pov-intus esti uzita, neniam rajtas esti uzota.**

**Kion do ni faru por ke neniam plu okazu la samo? Kiel ni kreu la mondon en kiu sen iu ajn dubo armiloj ne bezoniĝas?**

**Ni jam ne plu rajtas solvi niajn konfliktojn kaj decidi per konkuro de ĉion detruanta forto ĉe kiu flanko staras la Dio. Nun ni devas alpreni aliajn metodojn por forigi konfliktojn, ekzemple per interparoloj, negocoj, interkonsento kaj leĝo.**

Kelkaj libroj aperis okaze de la Kongreso. Inter ili ni trovas speciale menciinda tiun titolitan: ***Historio por malfermi estontecon***. (Moderna Historio de Ĉinio, Japanio kaj Koreio).

Ĉiu Universala E-Kongreso havas iun specialan temon, la t.n. "Kongresa Temo", al kiu oni dediĉas la ĉefajn kongresajn debatojn kaj prelegojn. La kongresa temo de la jaro 2007 titoliĝis: **Okcidento en Oriento: akcepto kaj rezisto**. Unua interveno pri tiu afero estis, jam en la Solena Inaŭguro de la Kongreso, tiu de Tsuda Yukio, kiu pa-

rolis en la japana lingvo. Sekve ni transskribas la tradukon kiun faris pri ĝi Kimura Gorou:

Bonan matenon. Koran dankon, ke vi invitis min. Mi elkore gratulas pro okazigo de la 92-a Universala Kongreso de Esperanto.


Certe estus adekvate ĉi tie paroli Esperante, sed bonvolu permesi min uzi mian gepatran lingvon. Mi volas paroli pri la kongresa temo: "Okcidento en Oriento: Akcepto kaj rezisto".

Ĉi-jare inter januaro kaj majo mi instruis en universitato en Kalifornio kaj diversloke en Usono prelegis pri mia temo: hegemonio aŭ regado de la angla. Pri tiu sperto mi volas raporti al vi hodiaŭ.

La kongresa temo interese esprimas la streĉon inter Oriento kaj Okcidento. Okcidento ja profunde penetris en Orienton. Fakte Oriento multflanke okcidentiĝis. Ekzemple la vivstilo de ni japanoj klare montras tion. Ni alkutimiĝis al tio, manĝi McDonald's kaj trinki Coca Cola. Ni vestiĝas ankaŭ eŭropstile kaj loĝas eŭropstile. Tradiciaj japanaj loĝdomoj apenaŭ restas.

Kial Okcidento povis tiom penetri tra la tuta mondo? Unu kialo estas, ke okcidentanoj kredas sian kulturon kaj civilizon "universala" kaj altrudis per milita kaj ekonomia povo tion al la tuta mondo.

Okcidentanoj evoluigis sciencon kaj teknikon, invadis la tutan mondon kaj asertas, ke la tuta mondo iĝu okcidenta. Per tia t.n. "okcidenta universalismo" kaj "kultura imperiismo" la tuta mondo okcidentiĝis. Tiusence, "Okcidento super Oriento" pli ĝustas ol "Okcidento en Oriento". Oriento devis akcepti okcidenton. Tia okcidentigo okazis en la tuta mondo dum la lastaj 500 jaroj. Moderniĝo fakte signifas okcidentiĝon de la tuta mondo.




Sed kiam orientanoj rimarkis, ke ili perdiĝas en troa okcidentaniĝo, ili komencis rezisti. Orientanoj klopodis regajni suverenecon. Sed ekzemple en Japanio, post la Dua Mondmilito, estiĝis la regado de "Usono super Japanio". Tio daŭras ĝis hodiaŭ. En la lastaj 60 jaroj, Japanio pli kaj pli usoniĝis.

Hodiaŭ oni parolas pri tutmondiĝo. Tio fakte estas usoniĝo. Usonaĵoj iĝis monda normo: Ekonomie la dolaro kaj komunikade la angla.

Ĉu ni senreziste akceptu tian situacion? Ĉu ne indas pensi pri egaleca komunikado kaj lingva egaleco? Nun la angla regas super ĉiuj aliaj lingvoj. Tiel anglalingvanoj havas grandan avantaĝon, dum aliaj spertas "lingvan diskriminacion".

Mi diris al usonanoj, ke la regado de la angla kaŭzas "lingvan diskriminacion". Ili energie kontraŭis min, dirante, ke la mondo elektis la anglan. Kio estas la problemo?

Mi refutis: "Nun ni ne havas la liberon NE elekti la anglan." Mi atentigis, ke la granda potenco de la mondangla malebligas la uzadon de aliaj lingvoj. Sed por usonanoj memevidentiĝas, ke la angla estas la monda lingvo. Ili ne volis agnoski la ekziston de la problemo.

Sed la reago de la usonanoj al miaj atentigoj jenis: "Oni bezonas la anglan por travivi. La angla estas ŝlosilo al sukceso kaj prospero."

Mi refutis: "Ĉiu lingvo kaj kulturo estas nemalhavebla kaj protektindas."

Ili ree kontraŭis: "Lingvo kaj kulturo ĉiam ŝanĝiĝas. Krome, eĉ se lingvo perdiĝus, kulturo restas."

Mi denove refutis: "Lingvo ne estas distranĉebla de kulturo kaj identeco."

Tiel la diskuto daŭris senfine. Ŝajne mia vidpunkto ŝokis usonanojn. Sed la fakto mem, ke ili energie kontraŭis, estas signifoplena. Kiusence signifoplena? Ilia kontraŭstaro al mia argumento fakte montras, kiom gravas por ili la regado de la angla. Estas danke al tiu fakto, ke ili tenas sian avantaĝan pozicion en la mondo.

Mia starpunkto kontraŭas ĝuste tion. Do estas tute nature, ke anglalingvanoj malakceptas kritikon, kiu minacas ilian pozicion kaj profiton. Mi ankaŭ menciu alian gravan aspekton. Al multaj anglalingvanoj simple mankas la moralo de egaleca komunikado. Tial ili rigardas la regadon de la angla kiel naturan fe-nomenon.

Por forigi tian malĝustan konscion, necesas severa rezisto. Mi mem klopodas rezisti verkante kaj prelegante pri la problemo de la angla regado.

Ankaŭ la Esperanto-movadon, mi rigardas kiel movadon kontraŭ la mondangla. La ekzisto de Esperanto jam profunde pridemandas la regadon de la angla. En mia hodiaŭa parolo mi intencis konsciigi, ke "Okcidento en Oriento" fakte signifas "Okcidento super Oriento". Nia defio estas egaligi rilaton inter Oriento kaj Okcidento. Por tio simpla akcepto ne sufiĉas. Pli gravas rezisto.

Kaj por tia rezisto la Esperanto-movado povas ludi gravan rolon. Ekzemple esperantistoj povas kontribui al reformado de lingva instruado. Mi esperas daŭran evoluon de via agado.

Dankon pro via aŭskulto.

Pri tiu Kongresa Temo estis pliaj intervenoj kaj prelegoj dum la kongresaj tagoj, kun diversaj opinioj kaj malsaman vidpunkton. Ni resumos aliajn du kun opinioj de aliaj japanoj pri la sama temo. Usui Hiroyuki diris ke:

Oriento aŭ Japanio havis jenan dilemon: en la tempo kiam eŭropaj landoj koloniigis la mondon, do antaŭ pli ol cent jaroj, Japanio sentis bezonon lerni de Eŭropo. Tamen ne pro simpatio, sed por povi pli bone rezisti okcidenton. La postan imperiisman politikon de Japanio li klarigis per ia minuskomplekso de la japanoj fronte al Eŭropo.

Siaflanke, Yamasaki Seiko deklaris:

En Japanio okazis la movado "El Eŭropo en Azion" du fojojn. Unue en la malfrua 19a jarcento, kaj due post la fino de la dua Mondmilito. La unua estis reakcio al "El Azio en Eŭropon" de Hukuzawa Yukiti, la "Voltero en Azio", kaj la dua fare de la amaso sur la tajdo de la reveno de patriotismo post la flagelantismo. La dua estas akceptata de plimulto de la japanoj, kio simbolas la reakciiĝon de tiu lando.

Mia starpunkto ne estas tia. Oriento kaj Okcidento estas ne geografiaj konceptoj, sed historiaj.

Estas fluo de penso kiu rigardas la historion kiel procedon de la malvolviĝo de la libero. Mi akceptas ĝin kaj rigardas la Okcidenton la patrolando de la libero, dum Azio simbolas la malliberon: Se citi el la filozofio de la historio de Hegelo, en Azio la spirito de la homo estis mergita ankoraŭ en la natureco, kaj la individuo, ne akirinte en si la rajton de la libereco kiel subjektiva personeco, dependas de la naturaj akcidentoj. Tiu azia principo estis bazo de la japana imperiismo kaj ankoraŭ nun de la reakcia reĝimo. La tezo de la nuna Universala Kongreso havas ne pasintan sed prezencan signifon en tiu ĉi kongresa lando.

Kaj, kompreneble, ankaŭ la Kongresa Rezolucio fariĝis eĥo de tiu debato. Sekve ni transskribas tiun rezolucian tekston:

### *Rezolucio de la 92a Universala Kongreso de Esperanto.*

La 92a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninta en Jokohamo (Japanio) kun 1900 partoprenantoj el 57 landoj kun la temo "Okcidento en Oriento: akcepto kaj rezisto",

***Konstatinte,*** ke ideoj kaj influoj moviĝas ambaŭdirekte inter "Okcidento" kaj "Oriento", sed ke pro la aktualaj neegalecoj tiu reciprokeco iĝis nevidebla,

***Konstatinte***, ke tiu sama kaŭzo malhelpas ankaŭ la fluon de ideoj kaj influoj inter aziaj landoj,

***Notinte***, ke tro rigidaj konceptoj pri "Okcidento" kaj "Oriento" malhelpas interlokajn dialogojn, kaj

***Notinte*** kun kontento, ke la 2008a jaro estas proklamita fare de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj kiel Internacia Jaro de Lingvoj,

***Rekomendas***, ke la rilatoj inter civilizoj kaj kulturoj baziĝu ne sur konflikto sed sur interkompreniĝo, justeco kaj paco,



*La urbo Jokohamo*




*Kongresaj spektakloj*












***Konfirmas*** la potencialon de Esperanto por inter-ponti homojn de diversaj lingvoj kaj kulturoj,

***Atentigas*** samtempe pri la akuta neceso konsciiĝi pri interkulturaj problemoj en kaj ekster la Esperanto-komunumo, kaj rilati kun instancoj kaj asocioj kiuj jam okupiĝas pri tiaj problemoj,

***Deklaras***, ke la ekesto de regiona kunlaboro ankaŭ en Azio kaj aliaj mondopartoj estas esenca antaŭkondiĉo por la plua disvolviĝo de Esperantaj agadoj tie,

***Esprimas*** la senkondiĉan subtenon de la Esperanto-komunumo al vera plurlingvismo kiel rimedo por akceli unuecon en diverseco, kaj kuraĝigas esperantistojn energie labori por la plenumo de la celoj de Unuiĝintaj Nacioj por la Internacia Jaro de Lingvoj.-

Krom tiuj rilate al la Kongresa Temo, estis pliaj prelegoj dum la kongrestagoj. Ekzemple, tiuj organizitaj de la **Internacia Kongresa Komitato**, dediĉitaj al temoj kiel astronomio, medicino, geografio, filozofio, lingvo…

Ankaŭ estas kutima programero de la Universalaj Kongresoj la okazigo de ĝeneralaj asembleoj de multaj el la diversaj asocioj, grupoj kaj organizaĵoj de la ampleksa esperantista movado, inter ili, kaj ĉefe, la Ĝenerala Asembleo de **Universala Esperanto Asocio**, en kiu oni elektis la novan estraron.

Tri centoj da kongresanoj ĉeestis kiam la nova estraro sin prezentis. Ĉeestis ĉiuj novaj estraranoj krom Loes Demmendaal, kiun anstataŭe prezentis alia nederlandano, la eliranta estrarano Ans Bakker. La diskuton el inter la publiko partoprenis la eliranta prezidanto, Renato Corsetti.

Komence de la 90-minuta programero ĉiu unuopa estrarano diris kelkajn vortojn pri si mem.

Komencis la nova prezidanto Probal Dasgupta, kiu rakontis, ke li naskiĝis en Kolkato en Barato. Lia denaska lingvo estas bengala. Li parolas ankaŭ la anglan kaj la sanskritan. Li kreskis en Usono. Li estas lingvisto, doktoro de New York University pri sintakso. Laboris pri la rolo de la angla en Hindujo. Verkas kaj tradukas el la bangala. Revenis al Kolkato, kie li naskiĝis, antaŭ unu jaro. Membro de la Akademio de Esperanto ekde 1983, de 6 jaroj vic-prezidanto de la Akademio.

Ranieri Clerici rakontis, ke li naskiĝis en la jaro 1940 en Italio. Li parolas la italan. Sekvis klasikan liceon, li estis inĝeniero ĝis antaŭ kelkaj jaroj. Malkovris Esperanton estante 15-jara. Estis prezidanto de Itala Esperantista Junularo, vic-prezidanto de Itala Esperanto-Federacio, komitatano de UEA.

Claude Nourmont, la sola restanta el la malnova estraro, rakontis, ke ŝi estas francino, sed loĝas en Luksemburgio de 30 jaroj. Estis estrarano de UFE, prezidanto de TEJO, nun honora prezid-

anto de TEJO. Redaktoro de "Le monde de l' espéranto", estrarano de UFE pri kulturaj aferoj. En la estraro, respondecos pri kulturo, kongresoj kaj instruado, kiel en antaŭa estraro. Instruistino pri filozofio; diplomoj pri psikologio kaj art-historio. Laboris en biblioteko.
Barbara Pietrzak rakontis, ke ŝi naskiĝis en Varsovio. Konatiĝis kun Esperanto 15-jara. Ligita kun la movado ekde la komenco, kun Pola Esperanto-Junularo. Redaktis "Polan Esperantiston". Tuta profesia aktivado estis ligita al Esperanto, pere de la Esperanto-Redakcio de Pola Radio de 1968 ĝis januaro de tiu ĉi jaro. Instruisto, sed laboris pri tio mallonge. Fakoj: ĝenerala sekretario kaj informado.


*Probal Dasgupta, nova Prezidanto de UEA*

José Antonio Vergara rakontis, ke li venas el Ĉilio, kaj ne el la ĉefurbo, sed el la suda parto de la lando. Reprezentas laŭ sia opinio periferion, kun Probal Dasgupto kaj Hori Jasuo. La tuta nuna estraro reprezentas tion, kio Esperanto estas, alivorte tutmondiĝon, li opiniis. Liaj fakoj estas scienca kaj faka agado. Laŭ siaj propraj vortoj li estas "ĝisosta adepto de Zamenhof", fidela al niaj antaŭuloj, "ni faru same kaj eĉ pli".
Hori Jasuo rakontis, ke li venas el Japanio kaj estas 65-jara. Esperantistiĝis kiel knabo. Patro estis esperantisto. Intereso pri diversaj lingvoj. Finlernis Esperanton antaŭ 14 jaroj, ĉar ŝatas lerni lingvojn kaj amas pacon. De 20 jaroj serioze lernis Esperanton. Estrarano de Japana Esperanto-Instituto (JEI) pli ol 10 jarojn, respondecis pri "La revuo orienta". Verkas mallongajn eseojn ekde 1998, "Raportoj el Japanio", aperis 10 kajeroj. Antaŭ 6 jaroj fariĝis prezidanto de la azia komisiono de UEA (KAEM), respondecis/os pri tri aziaj kongresoj, en Seulo, Katmanduo, Bengaloro. Respondecas pri Esperanto en Azio. Japanio estas granda lando por Esperanto, ĝi havas devon sendi iun al UEA.
Loes Demmendaal estis prezentita fare de Ans Bakker. El Rotterdam. Aktivis en Nederlanda movado dum multaj jaroj. Prezidis la laboristan asocion, kunlaboris kiam la 2 organizoj (neŭtrala kaj laborista) kuniĝis. Volontulis en CO. Laboras en financa-administra fako. Nun havas pli da tempo. LKK-ano por UK Rotterdam, pri ekskursoj.
Post la prezentado, la nova Prezidanto de UEA salutis la ĉeestantojn per jenaj vortoj:
Estimataj geamikoj!
Mi estas estimanto de la amikecoj. Mi salutas vin en la nova rolo de via prezidanto, kiu havas la privilegian devon konstante aŭskulti vin. Esperanto estas specife amika kaj aŭskultema lingvo.
Ni donis unikan formon al nia helpemo ekde 1914. Dum la Unua Mondmilito ni peris mesaĝojn, manĝaĵojn, medikamentojn inter la militantaj landoj. Ĉu nur dum milito aperas tiaj urĝoj? Ne! Ĉiam ekfajras krizaj bezonoj, ĉu pro subita tertremo ie, ĉu pro konstanta nutraĵomanko aliloke. Niaj helpemaj komunik-rimedoj devas ĉiam esti pretaj aŭdi la petojn de akutaj bezonantoj kaj trovi kapablulojn, kiuj tuje kaj taŭge fajrobrigados la fajrojn – precize kiel dum militoj.


*Barbara Pietrzak, nova Sekretariino de UEA*

Ĉu tia ĝeneralega, skolta helpemado – okupiĝanta pri viktimoj de inundoj, de malsategoj, de tertremoj – estas vere prioritata en movado por neŭtrala mondlingvo? Ni jam respondis tiun demandon en 1914. Jes ja.
Ni estas helpema lingvanaro; ni kredas, ke la lingvoj devas per neŭtrala pontado plibonigi sian komunikreton. Kial? Ĝuste ĉar la plej drastaj suferantoj bezonas esti atingataj kaj servataj fulmrapide. Eĉ sur pli banala nivelo, ni ĉiuj ja scias, ke la delegita reto kaj aliaj UEA-strukturoj estas absolutaj antaŭkondiĉoj por nia kolektiva ekzisto, pli gravaj ol la gramatiko.
La nuna estraro laboras por plifirmigi niajn institucioj, ĝuste ĉar ni vidas en ili la esencon kaj

estontecon de la zamenhofa lingvo. Venas 2008, kiun UN deklaris la Internacia Jaro de la Lingvoj; kaj ni centjariĝos! Vi, kiuj kongresas, kaj precipe tiuj inter vi, kiuj staras ĉe la sojlo de UEA kaj ne en nia anaro, bonvolu ja aliĝi al la Asocio kaj kunagi kun ni! Vi trovos, ke ni helpas atingi ankaŭ viajn celojn.

La lasta kunsido de la komitato de UEA, kiu komenciĝis vendrede matene ja la 9-a horo, estis gvidita de la nova prezidanto, Probal Dasgupta. En la komitata kunsido estis nekutime granda publiko, proksimume kvindek personoj.




**La komisiono pri statutoj** de landaj kaj fakaj asocioj raportis pri la aliĝ-peto de Asocio de Esperantistoj de Taĝikio. La komitato decidis akcepti la aliĝpeton de la nova landa asocio.

La Internacia Ekzamena Komisiono de UEA kaj ILEI havos novan konsiston post konfirma voĉdono de ILEI en la sekva semajno. Laŭ la decido de la komitato de UEA, Probal Dasgupta, kiu ĝis nun estis prezidanto de la Ekzamena Komisiono, forlasas sian postenon por dediĉi sin al sia nova tasko kiel Prezidanto de UEA. Prezidanto de la Ekzamena Komisiono iĝos Mireille Grosjean.



Josep Franquesa Solé estis elektita kiel komitatano C, kun la celo ke li estu reprezentanto de UEA ĉe la Linguapax-instituto de Unesko en Barcelono, Katalunio. Li estas ankaŭ prezidanto de Kataluna Esperanto-Asocio, kiu tamen ne rajtas je rekta reprezentiĝo en la komitato de UEA, ĉar en Hispanio estas nur unu landa asocio de UEA: **Hispana Esperanto-Federacio**.

En ĉi tiu kunsido oni aprobis ankaŭ la buĝeton de UEA por la venonta jaro.

Tuj post la finiĝo de tiu komitata kunsido, estis diskonigitaj la rezultoj de la Belartaj Konkursoj de UEA. Ĉi-jare estis neniu konkursaĵo en la sekcio filmoj. La lastan tagon de la kongreso kronis la aŭkcio, laŭtradicie sub la gvido de Humphrey Tonkin, publika kunsido de la Akademio de Esperanto, kaj la internacia arta vespero.

Sabate matene je la deka komenciĝis la Solena Fermo de la ĉi-jara kongreso. En la komenco de tiu akto, Sinjoro Osmo Buller, ĝenerala direktoro de UEA, prezentis la podianojn. Sur la podio sidis la nova estraro kaj 3 eksaj prezidantoj de UEA, reprezentantoj de la Landa Kongresa Komitato kaj reĝisoro de ĉi-jara kongresa temo.

Dum la ferma ceremonio apartan atenton vekis la urbestro de Bjalistoko, Tadeusz Truskolaski, kiu parolante en bona Esperanto bonvenigis la gekongresanojn al la jubilea Universala Kongreso en Bjalistoko en la jaro 2009.

Sinjorino Barbara Pietrzak, nova sekretariino de UEA, faris raporton pri la kongresaj laboroj. Usui Hiroyuki, reĝisoro de ĉi-jara UK en Jokohamo, laŭtlegis la Kongresan Rezolucion, kiun ni transskribis aparte.

Poste, la nova prezidanto de UEA Sinjoro Probal Dasgupta faris ferman paroladon. Sinjoro Sibayama Zyun'iti, prezidanto de LKK de la 92-a UK, transdonis la kongresan flagon al Ans Bakker, reprezentanto de LKK de la venontjara UK en Roterdamo. Fine la Prezidanto de UEA Probal Dasgupta proklamis la fermiĝon de la jokohama UK per martelbato. Post la solena fermo jam ne estis programeroj, sed ankoraŭ dum du horoj funkciis la kongresa libroservo. Je la dua horo posttagmeze fermiĝis la pordoj de la ĉi-jara Universala Kongreso de Esperanto.

Por la gekongresanoj en Jokohamo la afero estis interesa ankaŭ de turisma vidpunkto, ĉefe rilate al ekskursoj. En la kongresa fotokolekto aperas bildoj de la ekskurso al la fama monto Fuĵio.

# ...kaj je ĉi-tiu horo, iomete da roz-humoro.

